

EL POPOLA

中國新道

# ĈINIO

2

1998

ISSN 0032 - 4361

**Bazaj rajtoj de ĉinaj laboruloj**

***Amantino de arbero***

**Pri reformado de  
kuracaj pagoj**



Spirala ŝtuparo

Foto de HENG YAJUN

## INTER NI

1998 estas la Jaro de Tigro laŭ la ĉina luna kalendaro. Tion eble vi jam sciis, leginte "Anekdotoj pri tigro" en la 1-a numero de nia revuo. La ĉina luna jaro komenciĝas de la Printempa Festo, por kiu oni sin ekpreparas tre frue kaj kiu daŭras plurajn tagojn. "Por pasigi la Printempan Feston" publikigita ĉi-numere ŝajne estas daŭrigo de "Anekdotoj pri tigro". Ĉinio estas granda, ke en ĝiaj multaj lokoj oni havas diversajn kutimojn pasigi la Printempan Feston, tamen ĉiuj ĉinoj tre ŝatas tiun tradician feston. Ni deziras, ke la feliĉiga jar-komenco alportu fortunon al vi.

Laŭ peto de iuj, ni prezentas bazajn rajtojn de ĉinaj laboruloj en la rubriko "Temo proponita de legantoj". Fakte, la ĉinoj ekhavis multajn rajtojn nur post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949. Tiuj rajtoj estas defendataj de la ĉina registaro. Ni prenu la rajton labori kiel ekzemplon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, por ke la ĉinoj, kiuj estis ĵus liberigitaj de

malsato, ĉiuj havu laboron, la ĉina registaro praktikis en tre mizera ekonomia situacio la politikon "ĉiuj havu okupon, tamen kun malmulta salajro". La politiko estis eble la plej taŭga rimedo dum longa tempo. Sed la sekvo estis, ke la entreprenoj ne prosperis kaj la laboruloj ne havis pli da mono. En la nuna situacio la ĉina registaro klopodas serĉi novan vojon por la entreprenoj kaj laboruloj. Tiel aperas la fenomeno, ke iuj fariĝis senoficaj kaj devas serĉi novan okupon.

"Pri reformado de kuracaj pagrimedoj" prezentas iujn ŝanĝiĝojn en la ĉina kuraca sistemo, kiu concernas la interesojn kaj rajtojn de la popolo.


Veĵĉi-o estas tre interesa intelekta ludo. Ni iam raportis pri ĝi, kaj ĉi-numere "Disvolviĝo de la ĉina veĵĉi-ludo" donas ion novan. Se vi deziras pli da informoj pri veĵĉi-o, bonvolu leteri al ni.

La Red.



# El Popola Ĉinio

2 [473] 1998




Impona tamtamado  
Foto de Wu Zhiyi

**EL POPOLA ĈINIO**  
Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
**Redaktata** de Redakcio de "El Popola Ĉinio"  
Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"  
**Direktoro:** Hou Zhiping  
**Adreso:** P.O.Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio  
**Telefono kaj telefakso:** +86-10-6832 1808

# ENHAYO

- |  |   |
|--|---|
| <p>2 <b>INTER NI</b></p> <p>4 Pri reformado de kuracaj pagoj</p> <p>6 <b>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:</b><br/>Bazaj rajtoj de ĉinaj laboruloj</p> <p>8 <b>ĈINAJ E-ISTOJ:</b><br/>Esperanto servu kiel kulturponto</p> <p>10 <b>ORIGINALE VERKITAJ:</b><br/>Tuŝo sur teron; Trapafita militkasko; Tio venas</p> <p>11 <b>SUR NIA LIBROBRETO:</b><br/>Nova, alloga invito uzi la ponton</p> <p>12 Kunlabori rete kaj Esperante</p> <p>14 <b>ESP-NOVAĴOJ</b></p> <p>15 <b>POR KOMENCANTOJ:</b><br/>Urbo en la okuloj de senmastra kato (Fabelo)</p> <p>16 Impona tamtamado</p> <p>17 Kulturado en dezerto</p> <p>20 Amikeco inter homoj kaj ardeoj</p> <p>22 Por pasigi la Printempan Feston</p> <p>24 <b>MULTNACIA ĈINIO:</b></p> | <p>Kiam ree sonis la <i>luŝeng-o...</i></p> <p>25 <b>HOMARO KAJ NATURO:</b><br/>Hejmo de cignoj</p> <p>28 Kampanino-belartistino</p> <p>29 <b>LAŬ LA SILKA VOJO:</b><br/>Ruino de antikvaj regnoj</p> <p>36 <b>FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:</b><br/>Aŭtomobilo amortizebla</p> <p>37 <b>KORESPONDI DEZIRAS</b></p> <p>38 <b>EKONOMIE:</b><br/>Haier strebas por mondfamiĝo; Kurantaj aferoj</p> <p>40 <b>JUNULARO:</b><br/>Debato kaj interŝanĝo</p> <p>42 <b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b></p> <p>44 Disvolviĝo de la ĉina vejĉi-ludo</p> <p>46 Amantino de arbaro</p> <p>48 Maljunulo Sa (Novelo)</p> <p>51 <b>ĈINAJ POŝTMARKOJ:</b><br/>Pentraĵoj de Zheng Banqiao</p> <p>2 Spirala ŝtuparo</p> <p><b>SUR LA DORSKOVRILO:</b><br/>[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]<br/>Karnavalaj maskoj en Binche; Karnavalo de Venecio</p> |
|--|---|



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                             |  |
|-----------------------------|--|
| 1. Zhenjiang (p. 4)         | 4. Jirem (p. 17)                                   |
| 2. Anhui-provinco (p. 8)    | 5. Rongshui-a Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio (p. 24) |
| 3. Chenggu-gubernio (p. 20) |  |

# Pri reformado

**A**NTAŬ nelonge mia maljuna konato malvarmumiĝis. Tiamante, ke tio kaŭzos al li alian malsanon, li en-hospitaliĝis. Dek tagojn poste, li resaniĝis. Sed, neatendite, la kuracpago superis dekmil juanojn (ĉ. 8.3 juanoj = unu usona dolaro). Ĉu estas bezonata tiel granda sumo por kuraci la malgravan malsanon? Fakte, la kaŭzo kuŝas en tio, ke la kuracado estas pagita de lia oficejo kaj pro tio la hospitalo postulis multe pli da mono.

En la pasintaj 40 jaroj preskaŭ ĉiuj oficistoj kaj laboristoj de la ĉinaj urboj estis favorataj de sistemoj de kuraca garantio. Estis ĉefe du tiaj sistemoj. Unu estis kurac-sistemo de ŝtata pago, kiu favoris la oficistojn kaj laboristojn de la ŝtataj administraj organizaĵoj, armeanojn-handikapulojn kaj studentojn. Kaj la alia estis kurac-sistemo de entreprena pago, kiu favoris la oficistojn kaj laboristojn de la ŝtataj entreprenoj. Ambaŭ sistemoj havas la samon: La kuracatoj ne estis pagantoj. Pro manko de efika rimedo por redukti la elspezon por kuracado, la profitemaj hospitaloj vendis mul-

tekostajn medikamentojn kaj aplikis altajn teknikojn kaj grandajn aparatojn en la kuracado. El tio rezultis, ke rapide kreskis elspezo por kuracado kaj terure malŝpariĝis monrimedoj kaj medikamentoj. Laŭ statistiko, ĉiujare la malracie elspezita monsumo por kuracado konsistigis 20% de la totala monsumo tiurilate. La elspezo por kuracado pli ŝarĝis la ŝtaton kaj entreprenojn ekonomie. En 1995 la ĉina registaro publikigis la sistemon de socia asekuro pri kuracado. Mi informiĝis de s-ro Cai, estro de la politika kaj leĝa departemento sub la Ministerio de Publika Sano de Ĉinio, ke la sistemo de asekuro pri kuracado de Ĉinio estas ellaborita post analizo de la ĉinaj kondiĉoj kaj la nunaj modeloj de samspeca asekuro en aliaj landoj. La sistemo de socia asekuro pri kuracado de Ĉinio, en kombino de socia mutualeco kaj individua konto, karakteriziĝas per mutuala asekuro, vasta amplekso kaj bona servo, kio favoras maljunulojn, kaj asekuro farita per individua konto favoras junulojn, kio garantios ilian vivon estonte en la maljuneco. Tiu sistemo baziĝas sur mutualeco kaj so-

lidareco.

Zhenjiang (Ĝenĝjang), Jiangu-s-provinco, estas unu el la urboj, kiuj la unuaj ekpraktikis la novan sistemon en Ĉinio. En hospitalo de la urbo mi vidis, ke multaj pacientoj, vicatendantaj por pagi kuracodon, tenas en la mano magnetan karton indikantan kuracotizon, t. e. 1% de la jara salajro de la paciento kaj tiom, je 5% kiom lia jara salajro, elspezata de la ŝtato aŭ entrepreno. La paciento rajtas disponi, akumuli aŭ heredigi tiun sumon da mono. Mi intervjuis kartotenantojn pri kuracaj pagoj. Laboristo Zhang diris: "La vestofarejo, kie mi laboras, profitas malmulte. Antaŭe, ĉe la jarfino pro manko de mono iafoje oni ne povis ricevi kontantan monon el la entreprena kaso por kuraco. Post ekpraktikado de nova sistemo en mia vestofarejo ĉiuj laboristoj ĝuis la rajton libere disponi la monon, indikatan de la magnetan karto, kio garantiis nian kuracadon." S-ino Li diris: "Pro tio, ke la laboristoj mem devas pagi parton por kuracado, ili ne povas laŭvole preni medikamentojn sen konsideri la prezon. Ĝenerale, la monsumo en la karto sufiĉas por



# de kuracaj pagoj

kuracado.” Kion do fari, se la monsumo en ĝi ne sufiĉas? Iu paciento diris al mi, ke tiuokaze oni povas peti helpon de la fonduso de la socia mutualeco, starigita de loka registaro ekskluzive por tiuj, kiuj bezonas pli da mono por kuracado, kaj ĝi respondecas pri sociaj mutualaj asekurrimedoj, je 5% kiom la totala salajro de la oficistoj kaj laboristoj, pagitaj de la ŝtato aŭ entrepreno.

Respondeculo de la Zhenjiang-a Administra Centro de Rimedoj por Asekuro pri Kuracado diris al mi, ke la elspezo por kuracado de la oficistoj kaj laboristoj de la urbo en 1995 malkreskis je pli ol 30 milionoj da juanoj, kompare kun tiu en 1994, nome, antaŭ reformado de la kurac-sistemo la procentaĵo de la oficistoj kaj laboristoj, kiuj ne ricevis ĝustatempan kuracadon pro sia financa malfacilaĵo, malkreskis de 26.5% al 2.1%; kaj la pokapa elspezo por kuracado, kiu devis esti pagita de la ŝtato aŭ entrepreno, de 54 juanoj al 0.77 juano. Pli ol du jarojn post ekpraktikado de la nova kurac-sistemo en la urbo, la kolektitaj asekur-rimedoj estis fundamente garantiitaj, la elspezo kaj elspezo estis ĝenerale

en ekvilibro kaj 91% de la oficistoj kaj laboristoj aprobas la novan sistemon. Mi konsultis administranton de la centro pri pago por tiuj, kiuj bezonas multe da mono por sin kuraci. Li diris, ke nun la registaro ne povas tute pagi por kuracado de la oficistoj kaj laboristoj, nek la socia fonduso por kuraca asekuro povas tre multe pagi por tio. La nova sistemo baziĝas sur la principo, ke pli da oficistoj kaj laboristoj estu favorataj de la sistemo de socia asekuro pri kuracado. La administranto diris, ke surbaze de enketado la centro difinis la maksimuman kontingenton pri pago por kuracado de oficistoj kaj laboristoj, kio certigas al plejparto da ili ĝuadon de la nova sistemo. Por solvi la problemon pri pago de granda sumo por kuracado estas decidite starigi fonduson de kuraca risko surbaze de mutualeco kaj solidareco.

Nun la sistemo de socia asekuro pri kuracado de Ĉinio estas en provado. Konforme al siaj cirkonstancoj, multaj urboj kompletigis la projekton de la asekuro. La Ministerio de Publika Sano de Ĉinio starigis instancon ekskluzive por solvi problemojn estigitajn en

praktikado. Respondeculo de la instanco diris, ke la asekuro strikte rilatas al ĉies propraj interesoj kaj bona reformado garantias la sanon de la popolo. Ĝuste pro tio, la ĉina registaro intensigis sian gvidadon super la urboj, kie oni provas la supre menciitan sistemon. Li diris ankaŭ, ke kun profundigo de la reformado aperis nemalmultaj problemoj, kiaj limigo de kuraca amplekso, plivastigo de kuraca asekuro kaj unuigo de administrado de socia asekuro. Por certigi la asekon pri kuracado de la naŭcent milionoj da ĉinaj kamparanoj la ĉina registaro daŭre subtenos la sistemon de koopera kuracado en la kamparo, kies kurac-rimedoj venas de registaro, vilaĝo kaj individuo laŭ malsamaj proporcioj. Dank’ al reformado de la kurac-sistemo en la ĉinaj urboj, ĉiuj oficistoj kaj laboristoj estos fundamente favorataj en la kuracado. Tiam la plialtiĝo de kurac-elspezo estos bridita, kio favoros ankaŭ aliajn urbanojn. Sekve, kvankam en multaj urboj kaj vilaĝoj de Ĉinio ankoraŭ validas la malnova sistemo de kuraca garantio, tamen la reformado estas neevitebla. ■

# Bazaj rajtoj de ĉinaj laboruloj

de WANG HANPING

*Mi volas koni laborhorojn, salajron, feriojn kaj emeritiĝon de ĉinaj laboristoj, oficistoj kaj kamparanoj.*

F. JURANDIR DE MELO (Brazilo)

**A**NKAŬ Jose Marquis el Argentino kaj Ernst Quietensky el Aŭstrio havas similajn demandojn. G. Brons el Nederlando interesiĝas pri la socia asekuro de Ĉinio.

La demando, kiajn rajtojn kaj garantiojn ordinaraj ĉinoj ĝuas, interesas nemalmultajn legantojn. Precipe la nuna ekonomio de Ĉinio rapide progresas, niaj legantoj donas pli multe da atento al la labora situacio de ĉinoj.

Plejparto da ĉinoj estas kamparanoj. Antaŭ 20 jaroj reformado komenciĝis en kamparo. Laŭkontrakta sistemo pri respondeca produktado anstataŭis kolektivitan laboron, kamparanoj ekhavis pli multe da decidrajtoj, kaj ilia entuziasmo por laboro altiĝis. Ili ripozas kaj ferias laŭ sia plaĉo, kaj efektiviĝis la principo "kiu multe laboras, tiu multe akiras". La vivo de maljunuloj dependas de ilia ŝparita mono aŭ de iliaj gefiloj. Tiuj, kiuj ne povas sin vivteni, estas helpataj de

kolektiva ekonomia organizo. Malmultaj kamparanoj el riĉaj vilaĝoj ĝuas sistemon de salajro kaj emeritiĝo. Do la demandoj de niaj legantoj rilatas ĉefe al laboristoj kaj oficistoj de urboj.

En Ĉinio, tiuj, kiuj estas almenaŭ 16-jaraj kaj laborkapablaj, havas egalan rajton de laboro. Dum longa tempo, sub sistemo de planizita ekonomio, en Ĉinio ne estis senlaboruloj, sed la vivnivelo estis tre malalta. Kiam reformado disvastiĝis de kamparo al urboj, la situacio de oficistoj kaj laboristoj rapide boniĝis. Plej rimarkinde estas, ke la laborhoroj mallongiĝis, dum salajro multiĝis.

Lu Xueli laboris en la Pekina Fremdlingva Presejo jam 27 jarojn. Ŝi eklaboris 18-jara kiel presistino pri "El Popola Ĉinio" k.t.p. Dum la unuaj dekelkaj jaroj, ŝia salajro altiĝis malmulte. Nun krom la baza salajro, ŝi ricevis diversajn aliajn pagojn, entute 800 juanojn (ĉ. 100 dolaroj) ĉiumonate.

Reformado alportis vigecon al la entrepreno. Nun la avangardaj maŝinoj de la presejo senĉese laboras, profito altiĝas jaron post jaro, en la lastaj 5 jaroj la salajro de laboristoj duobliĝis. Krome, tiuj, kiuj bone plenumas la taskon, akiras premion, kaj tiel diversaj pagoj eĉ superas la bazan salajron.

Sed ne ĉiuj entreprenoj havas tiel bonan profiton kiel la presejo. Tial nia lando praktikas sistemon de garantio de minimuma salajro por laboristoj de malbone funkcia entrepreno. La normoj de minimuma salajro diferencas per ekonomia situacio de diversaj lokoj kaj altiĝas laŭ ĝenerala salajronivelo. Nun en Pekino la minimuma salajro estas 290 juanoj.

Samtempe kun tio, multiĝas ankaŭ ferioj de oficistoj kaj laboristoj de urboj. Ekde la 1-a de majo 1995, nia lando praktikas la sistemon de 5-taga laboro. Ĉiutage oni laboras 8 horojn, ĉiusemajne ripozas 2 tagojn. En la Novjara Tago, Internacia Labora Tago, Nacia Festo kaj tradicia Printem-



pa Festo oni regule ferias. Krome estas aliaj ferioj, ekz. en la Virina Tago, virinoj ripozas duontagon.

Pro geedziĝo, forpaso de familiano, akuŝo, vizito de gepatroj aŭ edz(in)o en alia loko, oni povas ĝui feriojn. Virino, kiu naskas infanon, povas ripozi 90 tagojn, oficistinoj-akuŝintinoj eĉ 4-6 monatojn. Mia edzino laboras en suda Ĉinio, tial mi havas unu-monatan feriadon ĉiujare. Dum la ferioj oni ne akiras ĉiujn pagojn.

Antaŭ kelkaj jaroj Ĉinio ekpraktikis sistemon de feriado por salajruloj. Tiuj, kiuj havas almenaŭ unu-jaran servodaŭron, ĝuas 7-15 feriojn.

Entreprenejoj alfrontas konkurencon. Tiuj entreprenoj, kiuj bezonas longigi la labortempon, devas peti konsenton de oficistoj kaj laboristoj. La longigita tempo estas limigita, kaj oni akiras krompagon, kiu superas la kutiman salajron.

Bonigi laborkondiĉojn de la-

boristoj kaj altiĝi ilian vivnivelon estas tre grave por evoluo de entrepreno. Same kiel aliaj entreprenoj, la fremdlingva presejo havas infanĝardenon, sanitarejon kaj manĝejon, kaj respondecas por loĝado kaj kuracado de la oficistoj kaj laboristoj. Tamen la presejo faras tiuf flankan reformon, ekz. ĝi grandparte pagas por loĝado kaj kuracado, tio celas raciigi kaj efikigi la sistemon de bonstatiĝo. Pri tio malsamaj fabrikoj havas malsamajn manierojn.

En Ĉinio viro emeritiĝas 60-jara, oficistino — 55-jara, kaj laboristino — 50-jara. Tiuj, kiuj perdas laborpovon pro labor-akcidento aŭ malsano, povas anticipi emeritiĝi. Eventuale, iuj emeritoj povas daŭrigi sian laboron. Pro malmultiĝo de parto da subvencio, la akiro de emeritoj reduktiĝas. Ĝenerale, speciala prizorganto respondecas por ilia vivo kaj amuzo.

G. Brons demandis pri asekura sistemo, kiun oni praktikas en Ĉinio. Nemalmultaj entreprenoj

starigis por oficistoj kaj laboristoj asekurojn por vivo post emeritiĝo, por kuracado, por vivo post labor-akcidento kaj senlaboriĝo kaj por akuŝo. Nun el tiuj la asekuro por vivo post emeritiĝo estas plej vaste aplikata. Entreprenejoj pagas al asekura organo laŭ proporcio de salajro. Pli ol 100 milionoj da oficistoj kaj laboristoj jam aliĝis al la asekuro. Inter ili kvarono estas emeritoj. Aliaj asekuroj nur ĵus komenciĝis. Starigi fonduson de socia asekuro kaj plibonigi asekuran sistemon por helpi emeritojn, malsanulojn kaj senlaborulojn estas celo de Ĉinio.

La ĉina ekonomio pliaktivis pro ŝanĝiĝo de planizita ekonomio al la merkata, tio bezonas rilatan sistemon de leĝo. En 1994 Ĉinio publikigis "Leĝon de Laboro". La leĝo havas ne nur difinojn pri enoficiĝo, salajro, laborhoroj, socia asekuro kaj subvencio, sed ankaŭ tiujn pri laborsekureco, speciala protekto de laboristinoj kaj neplenaĝaj laboristoj kaj labor-trejno.

Laŭ la leĝo, laboruloj kaj ilia entrepreno devas subskribi kontrakton por difini ĉiuf flankajn rajtojn kaj devojn. La laborista sindikato de entrepreno reprezentas laborulojn por subskribi kolektivajn kontraktojn pri salajro, laborhoroj, laborsekureco, asekuro kaj subvencio. Se okazas io, rilataj personoj povas interkonsiliĝi por solvi konflikton, aŭ peti interpacigon, arbitracion aŭ eĉ proceson. ■



Lu Xueli en laboro

# ESPERANTO SERVU KIEL KULTURPONTO

de WANG HANPING

ĈIUJ landoj kaj nacioj havas siajn proprajn kulturon kaj arton. Kiel juna pentristo kreskanta en la medio de la tradicia kulturo de Ĉinio, Zhang Qianyuan deziris pli multe koni la kulturon kaj arton de aliaj landoj kaj fari interŝanĝon tiuflanke kun alilandaj kolegoj. Finfine li realigis sian deziron pere de Esperanto.

Post 3-jara studo en la fakultato pri belarto de la Suzhou-a Instruista Kolegio de Anhui-provinco, Zhang Qianyuan finis sian studentan vivon en 1989. Post tio li instruis estetikon en la Suzhou-a Eduka Instituto. Tiutempe li faris pli profundan studon de la ĉina kaj eŭropa estetikaj historioj. En ferioj li vojaĝis, faris pentradon kaj diligente studis ĉinajn klasikajn literaturajn kaj historiajn verkojn. Per tradicia pikturo li faris multajn pentraĵojn pri historiaj aferoj. Iuj el ili estas konservataj de belartaj departementoj de Ĉinio. En 1990 lia ĉinstila pentraĵo "Pluvo" gajnis la unuan premion en la Ĉina Arta Ekspozicio en Hongkong.

Hazarde li konatiĝis kun esperantisto. Informiĝinte pri la rolo de Esperanto en la internacia kultura interŝanĝo, li volis lerni ĝin. Gvidate de tiu esperantisto, li lernis la lingvon kaj post ne longe li povis iom paroli nian lingvon. Post tio li aliĝis al la Universala Artista Ligo de Es-

perantistoj.

En 1991 okazis la 76-a UK en Bergen, Norvegio. Zhang eksponis siajn pentraĵojn dum la kongreso. Li miris, ke en ĝi pli ol 2 000 esperantistoj el dekoj da landoj libere interparolis sen ajna interpretisto. Li persone spertis la rolon de nia lingvo kaj en la kongreso li konatiĝis kun pluraj artistoj de aliaj landoj.

eojn en la urbo, studis la tradiciajn kaj modernajn artojn de Turkio, spertis la vivon de la tieaj loĝantoj kaj kreis aron da pentraĵoj spegulantaj la vivon de la tieaj islamanoj.

Iutage Zhang vizitis galerion de la prezidanto de la Belarta Asocio de Istanbul, s-ro Ilhami Atalay, fama pentristo, kiu estas tre lerta en kombino de la orienta



Zhang Qianyuan inter membroj de E-kurso de la Popola Altlernejo de Svedio

Aŭguste de 1995 li partoprenis la 80-an UK en Finnlando. Post la kongreso Zhang veturis al Turkio. Helpate de la prezidanto de la Esperanto-Asocio de Istanbul, li instruis tajĝiĉuan-on kaj uŝu-on en sporta klubo, kio allogis multe da tieaj gejunuloj. Dum sia restado en Istanbul li vizitis preskaŭ ĉiujn galeriojn kaj muz-

arto kun la okcidenta kaj bone konas la ĉinan tuĉpentradon. Zhang faris improvizan pentradon por Ilhami Atalay kaj ĉi tiu invitis Zhang okazigi ekspozicion de pentraĵoj en la galerio. Decembre de 1995 kaj februare de 1996 ili kune okazigis ekspozicion de pentraĵoj. La loka televido raportis tion.





Zhang Qianyuan kantas ĉinan popolkanton en salono de turka nacia muziko

Printempe de 1996 Zhang revenis la hejmlandon. Li raportis al la kultura departemento de Anhui-provinco la artajn atingojn de Ilhami kaj lian helpon en okazigo de ekspozicio. Por akceli la artan interŝanĝon de la du landoj, la provinco okazigis maje de la jaro ekspozicion de pentraĵoj de Zhang kaj Ilhami, kiun vizitis tre multaj homoj. Post tio Zhang faris alian ekspozicion en Istanbul. "Turka Ĵurnalo" kaj aliaj ĵurnalismaj establoj raportis tion. La Turka Ŝtata Televizio D komentis: "Ni neniam vidis, ke la ĉina pentristo prezentis turkajn morojn tiel bele per tuĉpentraĵoj."

Aŭguste de 1996 Zhang flugis al Karlskoga, Svedio, por daŭre studi Esperanton en la Popola Altlernejo kaj lerni la svedan arton. Helpate de s-ro Lars Forsman, direktoro de Esperanto-fako de la lernejo, li okazigis 3-semajnan ekspozicion de pentraĵoj en la Popola Altlernejo kaj la Urba Biblioteko. En la ekspozicio la 8-metra pentraĵo "Animo de Argilaj Soldatoj kaj Ĉevaloj de Qin-dinastio" estis tre ŝatata de la svedaj spektantoj. La Sveda Televizio 2

prezentis programon pri lia ekspozicio. Intervjuate de raportisto de sveda radio, Zhang diris: "Svedio kaj Ĉinio ambaŭ havas longan historion de kulturo kaj arto, tamen pro lingva baro kaj longa distanco inter niaj du landoj, ni malmulte konas unu la alian. Ni devas komunikiĝi pli multe inter ni kaj laŭ mi, Esperanto, kiel neŭtrala kaj scienca lingvo, povas ludi tiun rolon." Karlskogaj ĵurnaloj publikigis plurajn artikolojn kaj laŭdis Zhang, ke li studas Esperanton kun la celo fari kulturalan interŝanĝon internacie.

En pentrado Zhang alte taksas ne nur la liniojn de la tradicia ĉina pentrarto, sed ankaŭ la kolorojn de la okcidenta pentrarto. Liaj pentraĵoj plejparte estas realismaj, tamen kun romantikismaj trajtoj. Dank' al tio liaj pentraĵoj liberigis sin el la kateno de la tradicia pentrarto kaj impresas tute freŝe. En 1995 lia pentraĵo "Blua Ĉielo, Stepo kaj Junaj Lamaoj" gajnis duagradan premion en la ekspozicio de modernaj ĉinaj pentraĵoj. En 1997 li ekstudis por magistreci pri estetiko en la Ĉina Akademio de Artoj.



Zhang Qianyuan (dekstre) intervjuata de raportistino de la Sveda Televizio

Zhang komparas Esperanton kun la ponto super Bosporo, kiu unuigas Eŭropon kaj Azion, la orienton kaj la okcidenton. Pere de Esperanto li volas konigi la ĉinan kulturon al la tuta mondo kaj la kulturon de aliaj landoj al la ĉina popolo. Li esperas, ke ĉiam plifortiĝos la interkompreno kaj kunlaboro de la diverslandaj popoloj en ĉiuj kampoj, sed ne sole en la kampo de literaturo kaj arto. ■

## Tuŝo sur teron

**J**UKKA estis tutan vintron senlabora. — Tio ne estis plaĉa, kvankam li ne lasis ĉiujn hejmlaborojn al sia edzino, kiu feliĉe ankoraŭ havis laboron en sia malnova laborejo — elektra akcesoraĵa fabriko.

Sed nun estis veninta printempo. La neĝo degelis rapide kun pluraj pluvoj, kion plu helpis intertempe flavaj sunradioj. Estis tempo telefoni al urbaj oficejoj por trovi personon, kiu povus lui al la familio pecon el la urbaj parceloj...

Jukka jam longe revis pri tio, ĉar li ne volis esti malmulte laboranta en la varma sezono, kiu komencis aperi en verda vesto el herboj kaj burĝonoj, kaj baldaŭ el folioj... La telefonado estis sukcesinta, la lupago por la parcelo pagita — nur iom da tempo, por ke la vetero iom varmiĝu...

Tio venis. Estis ankoraŭ iuj pluvaj tagoj kaj noktoj, dum kiuj la akvo lirlis el la pluvtuboj, kiuj grizis en la domaj eksteranguloj. Sed nun estis jam seka tago kun iom da sunlumo inter buntaj nuboj sur la ĉielo...

Li elprenis sian biciklon, kiu sin apogis al flava muro, kaj metis sur la ŝarĝrakon fosilon kaj rastilon. Nun li estis preta, ĉar la edzino ne povis kunveni, ĉar estis ŝia labortago. Fine do iom pli peza laboro...

La parcela tero odoris al freŝa printempa humo, dum Jukka puŝis en ĝin la fosilan akrilon. Ĝi knaris kaj knaretis, dum la akrilo fosis en ĝi... La plaĉa tuŝo en la teron printempan.

## Trapafita militkasko

**E**STAS la somero de 1945. La Dua Mondmilito en Eŭropo estis preskaŭ ĵus finita kun multe da kadavroj. Ni knaboj tamen ne multe pensis ĉi tiajn aferojn — se la patro revenis el la milito, ankoraŭ sen la difektoj vive.

Anstataŭ pensi la mondgravajn aferojn, ni tiam ludis tiujn tempetojn, kiujn ties tempa socia vivo al ni lasis, ĉar tiam ankoraŭ la infanoj devis multe fari hejmajn laborojn ankaŭ urbe. Nu, sur terdorsa deklivo mi trovis difektitan verdan militkaskon, kaj oni kunportis ĝin hejmen tamen lasis

ĝin en la korto.

En la sekvantaj tagoj ni, iuj knaboj, metis ĝin en la firston de iu trasegita eksa elektra fosto. — Komenciĝis ludo ĵeti ŝtonetojn sur la militkaskon — sen pensi la misteron de la trua militkasko kun la bruna remburŝtofo. Ni ĵetis kaj ĵetis ĝis... Apud la fosteto floris samtempe bela siringa arbedo kun siaj bluaj floroj, kiuj odoris ĉarme. Kia kontrasto: la trapafita militkasko — kaj la ĉarmaj siringaj floroj, kiuj aromis la vivon eternan...

Poste mia patrino tamen atentis la situacion. Ŝi ordonis forporti la kaskon. Ni knaboj obeis... La kasko revenis al la terdorso, kiu kuŝis malantaŭ nia hejmo proksime al arbedoj, pinoj kaj piceoj...

Pli poste mi fariĝis en la matura aĝo esperantisto. Mi komprenas tute la malgajegan aferon. Mi ne plu volas militojn inter nacioj — sed la siringoj plu floru kun sia ĉarma aromo! Ni esperantistoj celu eĉ iomete konstrui pacon — guton post guto, kiel diras nia esperantista kanto...

## Tio venas

**Ĉ**IUJARE tio venas kun la folioj, kiuj ŝanĝas siajn kolorojn al aliaj: la brunaj, grizaj, flavaj, ruĝaj kaj diversaj tonoj inter ili mikante la kolortonojn ĉarme, fabele — mort senteble... La aero estas jam malpli varma ol somere. La ventoj ne plu tiel karesas la homojn kaj naturon, kiel ankoraŭ en la antaŭa sezono... La folioj, kiuj jam ŝanĝis siajn kolorojn, elfiksiĝas el la arboj kaj arbedaj branĉoj, kiuj fariĝas kiel senvestiĝintaj atendante ankoraŭ la pli malvarman sezonon: la vintran.

Sed ne tiel malbone, dum la plenkreskuloj kaj pliaĝaj infanoj rastas kaj balaas stokojn da falintaj folioj, ofte plijunaj infanoj en ili trovas siajn ludejojn... Tio nature ne plaĉas al la personoj, kiuj ŝvite kolektis la stokojn, ĉar ofte la infanoj kun la hazardaj ventkapricoj malstokas la diverskolorajn amasojn, dum la laboron oni devas ripeti...

Kiel mi jam menciis, la ventoj apartenas aparte al ĉi tiu sezono almenaŭ ĉi tie. Tio estas unu aspekto, kiu kreas la aŭtunon iel plaĉa por la infanoj kaj adoltoj, kiuj kapablas kapti ĝin iel fantazie. Pri la aŭtuno ekzistas multe ekzemple en la diversaj artaj fakoj kaj branĉoj, kiuj priskribas ĝin vorte, desegne aŭ muzike.

Tial venu la aŭtuno — ni ne timas vin...

de PENTTI TÖRMÄLÄ (Finnlando)



# Nova, alloga invito uzi la ponton

de ARTUR E. ILTIS (Germanio)


*Mirrakontoj de Liaozhai*, Pu Songling, Elĉinigita de Laŭlum, Beijing, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1994. 541 p., kun ilustraĵoj, 14.5 x 21 cm, Bind. Prezo: 15.00 USD. Sendkosto: 5.00 USD.

Kiam nia Majstro kreis nian komunan lingvon, sen kiu ekzistis nek niaj verkoj nek niaj rilatoj kaj sekve nur parto de ni mem, li donis la materian substraton al vizio. Ĉi vizion li ne havis sola nek unua, sed antaŭ li, ĝi restis nura fantomo kaj kimerio. Ĝis tiam kunvenis angloj kun francoj, poloj kun rusoj, de tiam kunvenas homoj kun homoj. Esperantismo kaj homaranismo estas nenio alia ol la idea-spirita superstrukturo super la teknika rimedo de la lingvo. Ali-bilde, la lingvo estas ponto, sed la transiro al la alia bordo, la konatiĝo kun la transa flanko kaj la konstato, ke transborde vivas homoj kun samaj aspiroj kaj pretendoj, kun samaj ĝojoj kaj zorgoj, kun samaj virtoj kaj talentoj, kun samaj difektoj kaj misinklinoj: ĉi sperto riĉigas nian spiriton, vastigas nian horizonton kaj donas al ni pli da kompreno pri ni mem. Esperanto estas ponto ĉia-direkten kaj ĝi estas ponto por ĉiuj. Ju pli ni konscios tion, des pli ni konstatos, ke la tradiciaj direktoj de sudo kaj nordo, de oriento kaj okcidento ĉesas ekzisti: nordo estas ĉie, nenie estas sudo, kaj inverse. Eĉ pli: ne plu ekzistas landoj proksimaj aŭ malproksimaj, nek ekzotikaj aŭ esoteraj, ekzis-

tas nur nia timo aŭ inerto uzi la ponton, disfoje eĉ nia intelekta rezisto, niaj antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj.

Ĉi pensoj sin trudis al mi ĉe la legado de la traduko de *Mirrakontoj de Liaozhai*: ĝi estas nova, alloga invito uzi la ponton. Ne ĉino kun japano, sed subite homoj nur ĉine vestitaj, homoj pretaj renkonti nur aliajn homojn. Kio unuavide impresas fremda kaj surpriza, eble eĉ vekas ĝeniĝon aŭ perplekson, restas surfaca: la nomoj, jen de homoj (p. 529-533), jen de objektoj, bestoj kaj plantoj, eĉ de abstraktoj kaj ideoj. Sed ĉu gravas la maniero nomi unuojn de mezuro, de longoj aŭ pezoj, se fine ni konstatas, ke malantaŭ fasadoj kaj kostumoj vidiĝas ĉiam nur unu kaj sama realo: ni ĉiuj estas filoj de la Dio... La materio ĉie konfirmiĝas al koaguliĝinta spirito.

Jen la plej grava kaj interesa instruo de la impona volumo. Ĝi estas invito por la tutmonda esperantistaro forlasi la proprajn kadrojn kaj eniri alian mondon, laŭ la tempo (Pu Songling vivis de 1640 ĝis 1715, kiam Eŭropo konis la epokon de baroko), laŭ la geografio, laŭ la viv-medio flaŭra kaj faŭna, laŭ la rego-sistemo kaj laŭ religio. Sed ekce\*! Ĉio ĉi montriĝas kulisa kaj dekorata. Sub la sedimentoj de farboj kaj morteroj videblas la homo en ties ĉiam sama homeco, ajne, ĉu



li haŭtas blanke, flave, nigre aŭ ruĝe...

Kiaj do estas la temoj de ĉi universalaj homaj? La enkonduko ekzempligas kvaropon el ili: homaj ecoj, kritikado, amo de gejunuloj kaj popola saĝo. Efektive, tra multaj paĝoj ni renkontas riĉan arsenalon de popola saĝo. Efektive, tra multaj paĝoj ni renkontas riĉan arsenalon de suferoj, malfeliĉoj kaj misfortunoj, kruelaĵoj, mizero, korupto, perfido kaj perforto, adulto, trompo kaj reakciemo. Tra ĉio ĉi vidiĝas la intencoj aŭtoraj, indigno kontraŭ sociaj misoj kaj arbitroj, malkaŝemo kaj revelo, just-aspiro kaj piloriado kun dozoj jen de satiro aŭ simpatio, jen de milda moko kaj karitato. Mult-rilate ĉio ĉi memorigas pri niaj fablistoj, kies motivo, kies temoj kaj teknikoj, kies intencoj kaj pretendoj, kies feblo kaj senpovo similas tiujn de Pu Songling.

Ni elĉerpu tri ekzemplojn.

La filino de Dou (p. 232-235) kombinas la elementojn de kri-


mo kaj sekso, ingredientoj ne nur tradiciaj, kiel, por ekzemplo, en la klasikaj rakontoj de Boccaccio kaj Balzac, sed eĉ ankoraŭ en la trivialiĝintaj formoj de nuntempaj filmoj televidaj. La riĉulo Nan Sanfu delogas la filinon de la malriĉa kamparano Dou Tingzhang, promesas nupton, ŝin gravedigas kaj poste rifuzas. Post multaj peripetioj indaj je aventuraj romanoj, kun pluraj kadavroj, intrigoj kaj koruptoj, la justo venkas: Nan kondamniĝas al morto.

Songŝo pri lupoj (p. 339-343) alegoriigas la situacion de la potenculoj kaj ties misregadon. Songŝo de oldulo profete anticipas la finon: la dia ordo restariĝas, eĉ se helpe de linĉ-justico. Orgojlo kaj falo, megalomanio kaj humiliĝo, *jin-o* kaj *jang-o* — jen la eterne alternaj elementoj la mondon regantaj.

Cerva Herbo (p. 363) apartenas al kategorio alitipa, kiu frapas per sia kurto kaj koncizo, montras fintojn, ruzon kaj saĝon. Pro koplacio mortintajn vircervojn revivigas amor-avidaj cervinoj per aparta herbo salubra alportita el la valo. Cervo-maske vestitaj homoj profitas ĉi momenton: gongo kaj fusil-bruo dispelas la herdon kaj oni predas la mirindan herbon revivigan.

Aparte mi aprobas proponon (ne novan, sed renovigitan) pri prepozicia uzo de **dank** kaj **koncern** (ĉi listo daŭrigeblus per **help**, **kaŭz**, k.a.) kaj la numeralan uzon de **kelk** kaj **miljon**. Ĉio ĉi helpas igi la lingvon ankoraŭ pli plasta kaj elasta, konciza kaj preciza kaj rivelas la internajn kaj talentajn virtualojn de nia idiomo. Ĉu estas tro arogante esperi, ke la nunan selekton de *Mirrakontoj de Liaozhai* baldaŭ sekvos komplementa volumo, kiu liveros al ni la plenan abundon kaj reduondon de Pu Songling? ■

\*ekce — jen vidu.



La aŭtoro (sidanta) kaj alilandaj vizitantoj

**B**ELETRA monata gazeto *Penseo* fondiĝis en 1990 kaj rikoltis 62 numerojn ĝis la fino de 1996. Ĝi estas ŝatata ne nur de verkistoj, sed ankaŭ de amantoj de Esperanta literaturo. En 1994 *Penseo* estis honorita per la Premio Grabowski. Ekde 1997 ĝi estas eldonata de la Donghu-a Esperanto-Domo de Hubei-provinco zorgata de mi.

Dum la redaktado ni pensis pri eniro de la gazeto en Interreton, ĉar pro alta sendokosto multaj legantoj ne povas aboni ĝin, tamen en la reto *Penseo* trovos multe pli da legantoj. Samtempe, ĝi estos propagandilo en la reto por Esperanto.

Ĝuste tiam mi ricevis retmesaĝon de Pedro Macon el Hispanio, kiu diras: “Mi sugestas publikigi vian revuon (*Penseo*) en Interreto. Mi povas doni lokon por tion havi senpage, se vi akceptas.”

Tiam en mia urbo ĵus ekfunkciis retnodo, en la reto mi estis nur komencanto. La propono de Pedro estis tre ĝojiga, mi tuj respondis: “Jes, ni kunlaboru.”

Tuj Pedro respondis: “Mia sugesto estas direkti vin al <http://www.geocities.com>, kie vi povas akiri senpage 2 Mb por via revuo.” Kaj li rekomendis la kvartalon Tokio (<http://www.geocities.com/Tokyo/>) kaj informis min pri

# Kunlabori rete kaj Esperante

la adreso de Geourbo.

Geourbo estas senpaga retkonservejo kaj samtempe komerca entrepreno — kiam “enloĝiĝis” multaj hejmpaĝoj en ĝi, la zorgantoj enmetis reklamojn, per kiuj ili profitas. En la kvartalo Tokio troviĝas hejmpaĝoj pri kulturo de fora oriento, precipe de Japanio. Kaj Pedro “loĝas” en la kvartalo Ateno.

Nun Geourbo konsistas el 34 “kvartaloj”, kiuj havas po kelkajn partojn, en kiuj po 50 “familioj” formas unu “loĝ-areon”. Tie staras belaj “vilaoj” kaj “pensionoj”, kun biografieto de la “mastroj”, kaj oni povas libere elekti lokon por “enloĝi”.

Mia peto estis baldaŭ akceptita. La “urbestro” respondis: “Gratulon kaj Bonvenon al *Penseo*! Via adreso: <http://www.geocities.com/Tokyo/Flats/2394>. Via leterkesto: [penseo@geocities.com](mailto:penseo@geocities.com).”

Mi tuj komencis “ornami” mian “domon” — “pendigi” nacian flagon de Ĉinio, meti koloran “heĝon” ĉirkaŭ la “domo”. Mi formaligis la 63-an numeron de *Penseo* por meti ĝin en la novan “domon”. Sed mi misforigis la indkson, sekve la bela ornamaĵo ne povas aperi kune kun la gazeto. Tiam mi devis iri partopreni E-renkontiĝon en alia urbo, kie mi ne povis kontakti Interreton, do mi petis Pedro-n, ke li helpu min korekti kaj ilustru la gazeton kaj-meti ĝin en la “domon”. Mi informis lin pri la pasporto de *Penseo*.

En la sama tago mi ricevis respondon de Pedro, kiu diris ke *Penseo* jam estas preta en la reto, kaj proponis, ke mi diskonigu la informon pri apero de *Penseo* en novaĵ-grupo. Pedro donis adresojn ankaŭ de kelkaj aliaj Esperantaj novaĵ-grupoj. Ĉar la loka servomaŝino ne havas tian funkcion, alilanda samideano helpis min diskonigi la informon.

Iun tagmezon, mi kaj kelkaj s-anoj kolektiĝis

antaŭ la komputilo kaj trovis la adreson. Sur la ekrano aperis la literoj P E N S E O, kaj indekso. Sukcesis kunlaboro de ĉinaj kaj alilandaj e-istoj! Nun por e-istoj de la tuta mondo *Penseo* estas legebla en Interreto, kaj la vizitantoj povas sendi abonilon, donaci monon, kontribui verkaĵon kaj doni proponon al *Penseo* per retroŝto.

En la unua monato post apero de la reta varianto de *Penseo*, ni ricevis pli ol 30 retroŝtaĵojn, al kiuj ĉiuj ni respondis rete. Tio multe akcelis nian laboron. Nun, ne nur kelkaj literaturoamantoj, sed ankaŭ pli multaj samideanoj legas *Penseo*.

La reta varianto de *Penseo* nun estas neilustrita. Pedro proponis, ke ni beligu la gazeton. Ni plene utiligos la spacon de 2 Mb — prezenti novajn numerojn kaj aldoni bildojn kaj sonojn, por ke *Penseo* iĝu pli alloga. ■

\* La aŭtoro estas ĝenerala sekretario de la Hubei-a Esperanto-Asocio kaj zorganto de la Donghu-a Esperanto-Domo.

## Paco-Kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj,

Importo kaj eksporto de komercaĵoj, internacia geedziĝo.

Registrita numero: 14896279-1

Adr.: Direktoro Ling Bo, P. O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.

Tel/Fax: +86-551-2632545/ -4484606



## ĈINIO

● En 1996 fondiĝis la Internacia Agrikultura E-Asocio kun la celo disvastigi kaj uzi Esperanton en agrikulturo. Ĝia 3-4-monata organo "Internacia Agrikulturo", kun 20 paĝoj, jam havas du numerojn. Kontribuaĵoj estas bonvenaj. Adr.: s-ro Huang Yinbao, Scienc-teknika Komisiono, CN-744300 Jingchuan, Gansu, Ĉinio.


● Memore al la 105-a datreveno de la naskiĝo de fama ĉina literaturisto kaj simpatianto de Esperanto s-ro Guo Moruo, veterana esperantisto Qin Kaiji (Ĉin Kajĝji) eksponis lastatempe la de li kolektitajn dum dekoj da jaroj pli ol mil poŝtmarkojn, kovertojn unuataĝajn kaj memorigajn pri Guo Moruo en ties memorhalo.

● De julio ĝis septembro 1997 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis la poŝtmarkoseriojn "Antikvaj Temploj sur Wutai-monto", "70-jara datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo", "Ŝtonaj Skulptaĵoj de Shoushan-monto" kaj "La 15-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio". La Haikou-a Filatela Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisijaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn kun vortoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la 4 poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

## ĈEĤIO

● Tiu ĉi poŝtkarto estas nove eldonita en urbo Opava de Esperanto-Rondeto de Oko-Opava. Ĉiuj fotografiaĵoj en ĝi estas faritaj de entuziasma profesia fotografisto kaj esperantisto Josef Solnický. (Drahomir Kocvara)

### ★ Saluton el OPAVA




Poŝtkarto eldonita de Esperanto-Rondeto de Oko-Opava

## HUNGARIO

● En aŭgusto 1996, post la praga UK, ĉe *Eventoj* estis lanĉita nova servo "Interredaktore", kiu iĝis la kunlabora forumo de redaktoroj de E-gazetoj pere de interreto. Ĉ. 90 redaktoroj (plus UEA/TEJO-estraranoj) ricevas preskaŭ ĉiutage diversajn informojn kaj artikolojn aŭ por aperigi ilin, aŭ por simple informiĝi. La servo "Interredaktore" koncentriĝas al movadaj, organizaj informoj, sed ne traktas literaturaĵojn. La dissendendan materialon oni sendas al centra retadreso de *Eventoj*, kiu zorgas pri la aktualigo de reta datumbazo, kaj distribuas la artikolon (simile al iu "Esperanta novaĝentejo"). En la daŭro de la jaro estis dissenditaj 388 mesaĝoj. Ankaŭ vi povas utiligi la servon, se vi volas komuniki ion al E-redaktoroj, se vi havas interesan (movadrilatan) informon, artikolon, se vi volas iun informon distribui. Sendu vian retmesaĝon al "eventoj hungary. net" kun la mencio, ke la mesaĝo estas por "Interredaktore". (Lazlo Szilvasi)

## IRANO



En la traduka seminario

● En la 27-a de aŭg. 1997 en Teherano prof. M. H. Saheb-zamni proponis Esperanton kiel plej utilan lingvon en la traduka kampo, kiam okazis la traduka seminario aranĝita de la Instituto de Teknologio kaj Sciencoj "Kish". Li aludante devenon de la traduko kaj ties rolon en diversaj disvastiĝoj science deklaris: "Nur Esperanto povas fari ekrenesancon potencege tutmonde por ĉiuj kaj ĉiaj interkompreniĝoj kultura, ekonomia, politika ks., ĉefe scienca. En la konferenco partoprenis impone granda nombro da dezirantoj, kiuj antaŭe informiĝis pri E-programo kaj ties preleganto. Estas dirinde, ke prof. M. H. Saheb-zamni elektis por sia konferenco interesan titolon "Esperanto kaj traduka arto". (Mojtaba Kheir-Khah)

# Urbo en la okuloj de senmastra kato

(Fabelo)

**E**N arbaro vivis diversaj bestoj. Neniu el ili vizitis urbon, do ili volis scii, kia ĝi estas.

Iutage, senmastra kato, kiu promenis en urbo, revenis la arbaron. La bestoj ĉirkaŭis lin por demandi pri la urbo.

La kato estis fiera. Li skuis la kapon, rigardis tien kaj ĉi tien, kuntiris la brovojn kaj diris: “La urbo estas tiel granda, ke mi ne povas ĝuste konigi vin. Mi do montru al vi laŭ jena maniero!”


Unue la kato petis zebbron kuŝi surtere. Li diris ke en la urbo estas multaj vojoj, oni transiras la straton laŭ zebraj strioj. Sekve sub lia gvido ĉiuj suriris la zebbron. La zebro ne povis elteni. Li starigis, stamfis kaj diris: “Ŝajne la urbo estas dolora loko.”

La kato daŭrigis sian rakonton. Li suriris la

dorson de cervo kaj diris al aliaj bestoj, ke la urbo estas tre vasta. Tie la domoj, similaj al haŭtmakuloj de la bovino, staras tie kaj ĉi tie. Dirante tion, la kato pentris sur la korpo de la bovino per fingroj. La bovino ne toleris tion, ridis senĉese, foriris kaj diris: “Ŝajne la urbo estas tikla loko.”

La kato pensis, pensadis, frapante sian frunton kaj diris: “En la urbo estas aparta fenomeno. En ĝardeno kaj sur herbejo staras maldikaj longaj bastonoj. El ili ofte ŝprucas akvo.” Dirante, li petis elefanton per la longa rostro suĉi sufiĉe da akvo kaj turne ŝprucigi la akvon. La bestoj fariĝis malsekaj, ili gape diris: “Ŝajne la urbo estas pluvoza loko.”

Laŭ la rakonto de la senmastra kato la urbo estas tiel malbona, ke la bestoj dubis, ĉu la kato diris la veron. ■



# Impona tamtamado

de LI QIANG

Sur la Leŭsa Altebenaĵo fluas la Flava Rivero, lulilo de la ĉina nacio. Ĝi nutris la posteulojn de la nacio kaj naskis la ĉinan kulturon kun profunda bazo. Sur la kovrilo de ĉi tiu numero vidiĝas bravaj viroj, frapantaj tamtamojn. La foto estas farita de sur la Leŭsa Altebenaĵo. Ĝi bone prezentas la imponan etoson de la Flava Rivero.

Tamtamoj aperis en Ĉinio jam antaŭ tre longe. Ili havis striktan rilaton kun milito. Ĉe la batalo la komandantoj devis frapi tamtamon por kuraĝigi siajn batalantojn. La impona tamtamado ja aperis surbaze de sia senĉesa progreso kaj transformiĝis en popolan dancon. Ĝi estas tre ŝatata en la tagoj, kiam oni celebras riĉan rikol-

ton kaj festojn.

Por ludi tamtamojn la nombro de frapantoj ne estas difinita. Ifoje centoj kaj eĉ milo da tamtamantoj ludas samtempe. La ordinaraj kamparanoj, alivestitaj per antikvaj militistaj uniformoj, tamtamas en bonorda formacio, alte levante la fortajn brakojn kaj lerte svingante la batilojn. Ili brave dancas, forte batante tamtamojn aŭ gongojn kaj laŭte kriante por montri sian bravecon kaj imponecon. Iliaj movoj estas senĝenaj, sed la formacio ŝanĝiĝas laŭ bona ordo en impona etoso.



pona etoso.

Tamtamado, gongado kaj kriado mikse aŭdiĝas, kvazaŭ muĝus la Flava Rivero.

## ANONCO

Aperis en la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" en 1997 sume 24 fotoj.

Niaj fakuloj prijuĝis la 24 fotojn laŭ iliaj temoj kaj artoj. Jen premi-gajnintoj kaj iliaj verkoj.

Gajninto de unua premio:

**JCL. THUMERELLE** (Belgio)

"Baobaboj en Madagaskaro" (en la 11-a n-ro)

Gajnintoj de dua premio:

**A. SOCHACKI** (Pollando)

"Kaskado" (en la 10-a n-ro);

**SLAWOMIR SZYMALA** (Pollando)

"Paraŝutado" (en la 2-a n-ro)

Gajnintoj de tria premio:

**ENRIQUE KOHEI** (Argentino)

"Mueliloj de Nederlando" (en la 1-a n-ro);

**R. G. PONS** (Argentino)

"Valo Trolope" (en la 3-a n-ro);

**STANIKOVIC P. NEBOJŠA** (Jugoslavio)

"Lacerto" (en la 12-a n-ro)

Gajnintoj de cetera premio:

**RUDOLF SKORUPPA** (Germanio)

"Ĉe Boat-kaja strato de Venecio" (en la 5-a n-ro);

**MALTE MARKHEDEN** (Svedio)

"Bieno en Skanio, suda Svedio" (en la 6-a n-ro);

**WANG LIHUA** (Ĉinio)

"Näsijärvi-lago de Finnlando" (en la 8-a n-ro);

**POUL THORSEN** (Danio)

"Nebridebla printempo en Danio" (en la 9-a n-ro)

Ni donos premiojn al la gajnintoj dum la 83-a UK, kiu okazos aŭguste ĉi-jare en Montpellier, Francio. La gajnintoj skribu al ni, ĉu ili partoprenos la kongreson aŭ ne. Se ne, ili komisiu al iu akcepti la premion. Sen tiuj du eblecoj ni sendos al ili la premion.

**La Red.**





# Kulturado en dezerto

Teksto de SHU MEI  
Fotoj de LIU SIGONG

**T**ROSEKECO kaj sablo-vento regas preskaŭ en ĉiu jaro.” Tio estis trafa priskribo de la dezerto Jirem en Interna Mongolio. Sed nun la dezerto estas bone konata gren-produktejo. En la pasinta jaro ĝi produktis 3.6 miliardojn da kg da greno. Lokaj kamparanoj diris, ke ili ŝuldis tion al sciencoj.

Montrante prosperantan maizon sur sia kampo, kamparano Li Bingxin diris al mi, ke dank’ al scienca kulturado, la hektara maiz-produktokvanto kreskis de 5 mil kg al 15 mil kg. Laŭkontrakte li kulturis 3.3 hektarojn da kampoj kaj enspezis pli ol 20 mil juanojn per vendo de maizo en la pasinta jaro. Mi rimarkis, ke inter bedoj da maiz-plantaĵoj kreskas arakido, sukerbeto kaj ŝenoprazo. Li diris, ke por miksa kulturado necesas aparte atenti kulturvarion, tempon de semado aŭ plantado kaj distancon inter sulkoj, cele doni sufiĉe da sunlumo kaj aero al ĉiuj kreskaĵoj. Tiam venis teknikisto, kiu instruis lin pri la supre dirita miksa kulturado. Ni triope venis al 0.7 hektaro da eksperimentaj parceloj de Li

Bingxin. Ĉiuj vilaĝoj havas eksperimentajn parcelojn kun areo de 3-10 hektaroj, kulturatajn de kamparanaj familioj surbaze de memvolo. Kaj la agronomia stacio de la subdistrikto liveras al ili semojn, kemian sterkon kaj insekticidon. Sur tiaj kampoj oni eksperimentas novajn kaj malno-



Plasta membrano evitigas perdon de akvo en grundo

vajn variojn kaj teknikojn kaj, kompreneble, akiras malsamajn rezultojn. En sezono de semado, sterkado kaj uzado de insekticido, la stacio donas tiuflankan konsultiĝon al vilaĝanoj. Ĉiu vilaĝa teknikisto portas sur si la taskon ĉiutage kontroli damaĝon de fiinsektoj kaj efikon de insekticido sur eksperimentaj parceloj kaj poste raporti tion al la supera instanco. Mi informiĝis de iu vilaĝa teknikisto, ke ĉiuj novaj varioj kaj teknikoj estas elprovitaj en la eksperimentaj parceloj kulturataj de la stacio kun la celo grandaree disvastigi la kulturadon en la sekvanta jaro. Li diris, ke la sukceso en kulturado en Jirem-dezerto estas atribuita al uzado de sciencoj, enkondukado de novaj varioj kaj teknikoj, trejnado de teknikistoj kaj ĉeloka konsultiĝo. Tio multe plialtigis la nivelon de la kamparanoj pri terkulturado.

La alta produktokvanto de greno ricevita per kulturado en dezerto neniel disigeblas de abundo da subtera akvo de la loko. Mi vidis, ke en ĉiuj vilaĝoj estas kanaloj kaj putoj kun elektraj pumpiloj. ■



Labor-paŭzo




Konsultiĝo





Antaŭ grenejo



Greno transportota aliloken



Tenejoj de greno



# Amikeco inter homoj kaj ardeoj

**A**NTAŭ 5 jaroj maljunulino Chen Xiulian kviete forlasis la homan mondon, pasiginte ĉ. jarcenton kaj adiaŭante la de ŝi zorgeme protektitajn “amikojn” — ardeojn. Ŝiaj samvilaĝanoj malĝojis pro ŝia morto, kaj regis granda funebro ankaŭ sur la ĉielo. Tiam pli ol dekmil ardeoj, kiuj devis migri suden antaŭ duonmonato, rondflugis malalte kaj faris tristan kriadon. En la sekvanta tagnokto ili kolektiĝis antaŭ kaj post la domo de Chen kaj neniu el ili laŭte kriis. Oni diris, ke tio estas adiaŭo de la ardeoj al la maljunulino. Je la tria frumateno ili ekmigris bonorde.

Estas rakonto pri amikiĝo de Chen kaj ŝia familio kun ardeoj.

La hejmo de Chen estas en Chenggu-gubernio, Shaanxi-provinco, sude de Qinling-montaro. Tie regas bela medio: densa arbaro, multe da cisterno kaj akvokonservejoj, blua rivero fluanta de montpiedo. La lazura ĉielo kaj verda montaro kunfandiĝas en la tuto. La 16-an de marto 1969 naskiĝis nepino de Chen Xiulian kaj la tuta familio dronis en ĝojo. Ekster ilia atendo, paro da oraj ardeoj malsuprenflugis en la korton.

Oni diris, ke tio estas malfavora aŭguro, ĉar tiuspeciaj ardeoj loĝas surdorse de bovo kaj estas mallaboremaj. Tial vidinte ilin, la filo de Chen Xiulian prenis ĉasfusilon por pafmortigi ilin. Chen Xiulian tuj malhelpis lin: “Ankaŭ birdoj estas vivuloj kun animo. Mi malpermesas tuŝi ilin eĉ je unu plumo!” La filo obeis sian patrion. Poste la paro da ardeoj ne nur frekventis la hejmon de Chen, sed ankaŭ konstruis neston sur la arbo antaŭ la domo kaj elkovis siajn idojn.

Ĉiutage, kiam Chen Xiulian manĝigis siajn kokojn, ankaŭ la ardeoj manĝis la nutraĵon kune kun ili. Aŭtune de tiu jaro la ardeoj migris suden. Sed en la sekvanta printempo ĉirkaŭ la domo de Chen ĉie aŭdiĝis kantoj de ardeoj. Ho, pli ol 20 paro da ardeoj!

Pasis jaroj unu post alia... La loko fariĝis mondo de ardeoj. Ardeoj multiĝis tago post tago. Sur la monto en la arbaro kun areo de 2 hektaroj laŭkontrakte priplantita de la familio de Chen regis granda bruo. Sur arboj vidiĝas blankaj, grizaj kaj brunaj ardeoj kaj iliaj nestoj. Tie kreskas ĉefe vimenoj. Por ke la birdoj vivu en kvieta medio, la familianoj de Chen ne plu iris al la monto por haki arbedojn. Maljunulino Chen klare sciis, ke la birdoj ŝatas la lokon. Tio montras, ke la tieaj homoj estas bonkoraj al ili. Ĉiu aŭtune, kiam la birdoj flugis suden, ŝi kredis, ke ili revenos en la sekvanta printempo.

Kiel atendite de la maljunulino, la ardeoj reflugis ne nur akurate ĉiujare, sed ankaŭ kun pli da kunuloj. Ke ardeoj, najtingaloj kaj aliaj birdoj grandkvante aperis, tio estas senprecedenca en la ornitologia historio de Shaanxi-provinco.

La nepino de Chen prenis ardeojn kiel siajn amikojn de tiam, kiam ŝi eklernis paŝadon. La knabino ofte stumble postkuris ardeojn en la korto kiel kokojn. La ardeoj jen deflugis, jen malsuprenflugis. Kiam la knabino vizitis lernejon, ĉiam akompanis ŝin survoje kelkaj ardeoj, jen antaŭ ŝi jen malantaŭ ŝi.

Aprilo kaj majo estas reproduktiĝa sezono de ardeoj. La petolemaj birdidoj, profitante de la foresto de siaj gepatroj, ŝtele elnestiĝis. Sed ili neniel sciis, ke agloj, sovaĝaj katoj kaj serpentoj atendas ilin. Tial, la 7 membroj de Chen-familio gardis la birdojn surmonte unu post alia en majo. Ili portis la panikiĝintajn ardeidojn en nestojn.

Sovaĝaj katoj kaj serpentoj ĝenerale elnestiĝis nokte por serĉi manĝaĵojn. Ili voris ovojn de ardeoj kaj kaptis ardeidojn. Tiam la grandaj malfortaj





Chen Xiulian nutras ardeon.

ardeoj kun korŝira kriado teruriĝe flugis super la monto. Se nur la familianoj de Chen aŭdis tion, ili tuj rapidis por savi. Eĉ en ventaj aŭ pluvaj tagoj ili trairis marĉon, grimpis sur arbon por protekti la birdojn. En iu pluva maja tago Chen Xiulian, aŭdinte korŝiran kriadon de ardeoj, tuj direktis sin al la monto. Kiam ŝi stumble atingis la lokon, ŝi trovis, ke du junuloj elnestigis ovojn sur arbo, ŝi severe kritikis ilin kaj zorgeme remetis la ovojn en la neston. Sur la revena vojo ŝi neatente falis surteren kaj la tuta korpo malsekiĝis. Reveninte hejmen, ŝi malsaniĝis kaj kuŝis la tutan semajnon.

La 2-hektara monto kun prospera arbaro estas paradizo por birdoj kaj malpermesita por homoj. Por “blokadi la monton kaj protekti la birdojn” la familianoj de Chen malpermesis tie haki brullignon kaj paŝti brutojn. Komence pro nekomprene ŝiaj samvilaĝanoj estis malkontentaj pri tio. Poste ili trovis, ke la birdoj sur la monto pli kaj pli mul-


tiĝis. Ili ekkomprenis la bonkorecon de la familio de Chen. Ekde tiam oni ĉiam silente trapasis la monton por ne damaĝi la birdojn. La filo de la maljunulino Chen estis ĉasanto, kaj li ne plu ĉasis ekde apero de ardeoj, sed admonis al la samvilaĝanoj: “La tero estas komuna hejmo de sovaĝaj bestoj kaj homoj.” La ĉasantoj kvankam ne komplete komprenis lin, tamen demetis la ĉasfusilon kaj ekokupiĝis pri io alia por sin vivteni.

Ĉiujare la familianoj de Chen nombris la birdajn nestojn sur la monto: 4 000 en 1987, 6 000 en 1988 kaj pli ol 10 000 en 1990. Rigardante la amasojn da flugantaj kaj kantantaj ardeoj sur la ĉielo, oni sentas grandan ĝuon. La amasoj de ardeoj, tiel grandaj, multnombraj kaj dense loĝantaj, estas malofte viditaj ne nur en la loko, sed ankaŭ en la tuta Ĉinio.

Post forpaso de Chen Xiulian, ŝia filo pensis, ke la ardeoj ne plu revenos. Tamen, en la sekvanta printempo ili revenis arope akurate. ■

# POR PASIGI LA PRINTEMPAN FESTON

Teksto kaj fotoj de DI HUA



En foiro de la Printempa Festo



Virino kun bela kapornamo



Kultaĵo

La Printempa Festo kun fortaj naciaj gustoj estas la plej grava kaj spektakla festo en Ĉinio. La tagoj, en kiuj mi pasigis la Printempan Feston en suda Fujian(Fuĝjan)-provinco, estas neniam forgesoblaj por mi.

Nun la Printempa Festo en la loko ankoraŭ elspiras la antikvecon. La solenado daŭras de la vintra solstico (la 21a aŭ 22a de decembro) ĝis la Lanterna Festo (la 15a de la unua monato laŭ





lasta tago de la sama monato ili donas novjaran saluton al la kamen-dio, atribuante al li benadon de ĉiutaga vivo.

Antaŭ la Printempa Festo oni havas grandan okupitecon por prepari manĝaĵojn por kulti siajn prapatrojn, kamen-dion kaj aliajn diojn.

Oni faras kultadon de siaj prapatroj plejofte en la hejmo vespere de la jarfino. Tiam oni preparas bongustajn pladojn kaj ŝajne regalas la forpasintojn ĉe la manĝotablo por esprimi sian sopiron al ili.

Post kultado la tuta familio kune ĝuas la festenon, algluas printempajn vers-parojn al la pordoj, eksplodigas petardojn kaj maldormas ĝis la profunda nokto.

La 15-a de la unua monato laŭ la ĉina lunkalendaro estas la tradicia Lanterna Festo de Ĉinio. La 9-an de la monato oni komencas fari, aĉeti aŭ donaci lanternojn. En la nokto de la festo oni kutimas spekti lanternojn. La vigla draklanterna danco markas kulminon de la spektaklo.



Kultado en templo

la ĉina lunkalendaro). Ekde la vintra solstico tiuj, kiuj lernas, laboras aŭ vizitas siajn parencojn aliloke, unuj post aliaj revenas hejmen por feliĉe pasigi la Printempan Feston kune kun siaj familianoj, kaj ankaŭ ĉi tiuj sin preparas por ĝi.

Krom aĉeti festajn bezonaĵojn, ĉiuj familioj ankaŭ purigas domon kaj lavas vestojn kaj litaĵojn. Poste, ili kultas siajn prapatrojn, kamen-dion kaj aliajn diojn. De la 23-a de la dekdua monato laŭ la ĉina lunkalendaro ĝis la



Festaj donacoj



# Kiam ree sonis la *luŝeng*-o...

de ZHANG SUILU

**K**IAM ree sonis lia *luŝeng*-o, absorbitaj estis mode vestitaj turistoj anstataŭ liaj samvilaĝanoj. La ĉirkaŭe kolektiĝintaj spektantoj aplaŭdadis lin. La ardaĵ rigardoj inspiris lin kaj graciigis liajn dancopaŝojn. Kun neretenebla plezuro li invitis kelkajn spektantojn kune danci en la somera stelplena nokto.

La altstaturaj viroj, eble eŭropanoj, ĉiu kun alta nazo kaj blondaj haroj, verŝajne ne povis sekvi lian ritmon kaj komike dancis. Tio ridigis lian patron maljuna Liang, vilaĝestron, kiu staris ne malproksime.

“Hodiaŭ mi instruas eĉ alilandanojn,” tion pensante, li kun fiereco ludis la *luŝeng*-on pli sonora.

Maljuna Liang neniam imagis, ke lia filo kune kun siaj amikoj altiris tiel multajn turistojn kaj sekve progresigis la lokan turismon per la *luŝeng*-ludado heredita. “Por ni kamparanoj la neŝanĝebla devo estas terkulturado kaj brutobredado. Ludi *luŝeng*-on ne donas rizon.” — 7 jarojn antaŭe tiu opinio regis en Changlai-vilaĝo sub la Rongshui-a Mjaŭnacia Aŭtonoma

Gubernio de Guangxi. Tiam la averaĝa jara enspezo de la pli ol 500 vilaĝanoj estis nur 200 juanoj, tamen ili rigardis tion natura, kaj kun subvencio ili vivis trankvile.

Historie la mjaŭ-oj ne volontis resti en postiĝinteco, ili ĉiam klopodis por sin liberigi de malriĉeco. Prave diris iu aŭstralia erudiciulo, ke “la mjaŭ-oj estas nacio ĉiam iranta”. En la pasintaj 5 mil jaroj la mjaŭ-oj faris senĉesan migradon. Antaŭ 7 jaroj junuloj de Changlai-vilaĝo la unuaj ekspluatis la lokan turismon. Unu jaron poste, la vilaĝo enspezis 5-oble pli multe. Iuj familioj konstruis novtipajn etaĝdomojn kaj aĉetis koloran televidilon, fridujon, videoaparaton kaj motorcik-

lon.

La vilaĝanoj ŝuldas tion al *luŝeng*-o, kiu rolis kiel simpla muzikilo en la pasinteco kaj nun fariĝis nemankigebla turisma amuzilo. La turistoj interesiĝas ne nur pri tiea pejzaĝo, sed ankaŭ pri *luŝeng*-melodio kaj *luŝeng*-danco. Tiel ili ĝuas la naturon kaj naciminoritan moron, kiujn ili ne povas sperti en urbo.

La mjaŭ-oj estas gastamaj. Ĝenerale ĉe la enirejo de la vilaĝo gejunuloj bonvenigas vin, invitas vin en sian hejmon, regalas vin per manĝaĵoj kaj rizvino. Se knabino tiras al vi la orelon, tio signifas, ke ŝi volas taste saluti vin. Se vi ne kutimas la rizvinon, vi povas ĝui la lokajn bongustaĵojn: acidaj viando, fiŝoj kaj bambuŝosoj. Certe vi partoprenos en la *luŝeng*-danco, se vi interesiĝas pri tiu nacio. Ne eblas por vi studi en libroj la kulturon de la mjaŭ-oj, ĉar sen skriba lingvo, la mjaŭ-oj disvastigis sian kulturon per aktivadoj, el kiuj unu estas *luŝeng*-danco.

Nun la vilaĝo Changlai fondis specialan *luŝeng*-ensemblon por altiri pli multe da turistoj kaj pli prosperigi sian vivon. ■



Tambura danco kun *luŝeng*-ludo



Serĉo de nutraĵo

# Hejmo de cignoj

Teksto kaj fotoj de LIU CHUNCHI


Aroj da cignoj vivas ĉe Yunus-marĉo en la supra baseno de Kaidu-rivero meze de Xinjiang, Ĉinio. La marĉo portas ankaŭ la nomon Cigna Lago Bayanbulak, kiu signifas en la mongola lingvo belan kaj fekundan lokon.

Ĉirkaŭita de neĝmontoj, la lago kun klara akvo kuŝas en profundo de Tianshan-montaro. Pro siaj humida kaj malvarmeta klimato, abundaj herboj kaj kvieta medio, la loko estas ideala somerumejo por cignoj. Printempe diversaj cignoj arope venas de Hindio, suda Afriko kaj aliaj regionoj al la lago por reproduktado. Pro tio la loko fariĝis reprodukta bazo de cignoj kaj plej suda reprodukta regiono de grandaj sovaĝaj cignoj en la mondo.


En somero kaj aŭtuno regas viveco sur la stepo Bayanbulak. Cignoj arope ludas en la smeralda lago aŭ flugas en la lazura ĉielo. Post reproduktado ili denove flugas suden kun siaj idoj.

Rigardante cignojn kiel anĝelojn kaj feliĉigajn birdojn, la tieaj paŝtistoj bone protektas la naturan medion por cignoj, memvole nutras kaj defendas ilin. Dank' al tio la cignoj vivas komfortan vivon en tiu loko.







Cignoĵoj super la lago



Harmonio



Gardo



Cignoĵ sur akvo



La Cigna Lago



# Kampanino- belartistino



Fenestra papertondaĵo farita de Luo Zhanhua

**E**N Ĉinio multaj kampaninoj estas lertaj ne nur en terkulturado, sed ankaŭ en brodado, pentrado, plektado, teksado, papertondado k.a., kvankam iuj el la maljunaj estas analfabetoj. La 75-jara kampanino Luo Zhanhua en Heyang-gubernio, Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco, estas unu el ili. La de ŝi faritaj papertondaĵoj, diferencaj de la ordinaraj unukoloraj aĵuraĵoj, estas rigardataj kiel apartaj metiartaĵoj, montrantaj artojn de pakado, faldado, desegnado, tondado kaj algluado kiel unu tuton. Por fari ordinarajn papertondaĵojn oni bezonas nur tondilon kaj ruĝan paperon. Sed la papertondaĵoj faritaj de Luo estas tridimensiaj. Unue ŝi faras homan kapon, sur kiu ŝi pentras la vizaĝon, kaj poste eltondas vestojn, ĉapon kaj aliajn ornamaĵojn el koloraj paperpecoj. Sur fenestroj tiaj reliefo-similaj papertondaĵoj flirtas en venteto, kiel veraj homoj.

La tradiciaj papertondaĵoj, brodaĵoj kaj pentraĵoj de Shaanxi-provinco temas ĉefe pri la homa vivo. Oni simboligas la geedziĝon per fiŝoj naĝantaj en lotus-lago, per granato kaj vesperto — multon da gefiloj kaj feliĉoj. Sur papertondaĵoj la fiŝoj, birdoj kaj floroj estas difinitaj signoj, kies signifon bone scias la lokanoj. Tamen la papertondaĵoj faritaj de Luo vidigas teatrajn figurojn de la antikva Ĉinio.

Luo ŝatas teatron kaj multe interesiĝas pri la sorto de la teatraj herooj, kaj plie, ŝi bone kaptas en la memoro la intrigon de spektaklo post unufoja rigardo. Ŝi ofte komencas fari papertondaĵon tuj post finiĝo de la teatra ludo. Dank' al ŝia lerta manipulado tre rapide aperas viglaj figuroj sur

papero. Sen skizo ŝi povas lerte fari pli ol 100 teatrajn figurojn, kies plejparto estas virinoj: bravaj militistinoj kirasitaj antaŭ la militiro; mezaĝa virino, kiu portas siajn infanetojn kaj iras al la ĉefurbo por serĉi sian edzon; sincera knabino alivestita kiel viro por amafero...

La homfiguroj faritaj de Luo estas aparte allogaj ne nur per la mienoj, sed ankaŭ per la movoj. Ŝi kapablas kapti la movojn karakterizantajn la trajtojn de personoj kaj per troigo determini ilian teniĝon: Iuj tenas nigragazan ŝtatoficistan ĉapon en mano, tirante per la alia sian robon kaj malkaŝante la botojn, kio montras lian embarason kaj malĝojon; aliaj batalas per spadoj kun la dorso surtere aŭ kun la vizaĝo al la tero, kio montras la akrecon de la batalo; paro da geamantoj nevolonte etendas ĉiu sian manon por kapti tiun de sia amat(in)o, kio montras ilian malĝojan disiĝon... Pro facila moviĝemo, je eta ventoblovo la figuroj sur fenestroj moviĝas, kvazaŭ ili ludus sur scenejo.

En la festoj, tagoj de geedziĝo, soleno de la datreveno de naskiĝo aŭ unumonatiĝo de bebo la vilaĝanoj petas Luo fari belajn homfigurojn kaj alglui ilin al la


fenestro, tio donas varman kaj feliĉan atmosferon.

Nun la belaj papertondaĵoj vidiĝas ne nur sur fenestroj de la kaverndomoj sur la Leŭsa Altebenaĵo, sed ankaŭ en ekspozicioj de Pekino, kaj iuj estas presitaj sur poŝtkartoj kaj kovriloj de gazetoj, pro tio maljunulino Luo, kiu faras papertondaĵojn la tutan vivon, famiĝis kaj estas honorita kiel popola metiartistino de la provinco Shaanxi. ■



Luo Zhanhua faras papertondaĵojn.





# Ruino de antikvaj regnoj

Teksto de PANG NAIYUAN  
Fotoj de HAN HONG

**A**NTIKVE en la Okcidenta Regiono estis 36 regnoj. La Silka Vojo trapasis multajn el ili. Norde de Tianshan-montaro la loĝantoj plejparte vivis nomadisman vivon, do iliaj regnoj estis nomataj ankaŭ regnoj de migrantoj kaj sude de ĝi la loĝantoj, kiuj havis fiksan loĝejon sur oazo, plejparte sin okupis pri terkulturado, kaj iliaj vilaĝoj estis ĉirkaŭitaj de muroj kaj iliaj ĉefurboj — de muregoj, do oni nomis iliajn regnojn regnoj kun ĉirkaŭmurigitaj urboj. Vojaĝante laŭ la suda piedo de Tianshan-montaro, ni vizitis ruinon de tieaj antikvaj urboj.

## EN ANTIKVA URBO JIAOHE


La regno Cheshi sidis sur terkrutaĵo ĉirkaŭita de 2 riveroj kaj kun alteco de 30 m. Tie kuŝis la antikva urbo Jiaohe je 10 km okcidente de la urbo Turpan. En ĝi la difektitaj palaco, temploj kaj loĝdomoj, ĉiuj havas indiĝenan koloron kaj ne perdis sian majestecon. Kiam mi piediris sur strato profunde enkaviĝinta, ia mistero invadis min. Ĝi venis el post la dikaj muroj de la teraj domoj ambaŭflanke de la strato. Ili staras dorse al la strato kaj la pasantoj ne povis vidi kio estas ene. Mar-


ŝante sola sur la strato kvazaŭ en profunda valo, mi ĉiam sentis, ke ie ĉe la strato sin kaŝas io, kaj volis forkuri rapide, sed mi jam perdiĝis en tiuj interkruciĝantaj kaj profundaj stratetoj. Mi pensis en mi: kion la invadantoj povos fari, se ili eniros en tiujn stratetojn? Por konstrui fortikigitan urbon, kiu okupis gravan pozicion en dezerto, kaj al kiu mankis ligno kaj ŝtonoj, saĝaj Cheshi-anoj elektis tiun krutaĵon ĉirkaŭitan de riveroj kiel naturan ŝirmilon. Sur la krutaĵo ili konstruis korton kaj faris kavernon kiel domon. Poste ili ramis la elfositan teraĵon ĉe tegment-rando apud vojo, kaj tiel konstruiĝis altaj kaj dikaj muroj.

La subtera domo facile konstruebla estis varma vintre kaj malvarmeta somere. Antikva libro diras, ke por ŝirmi kontraŭ varmego la loĝantoj de la fajrobaseno tegis la tegmenton per kreto aŭ fosis kavernon kiel dormejon. Ĉiuj komercistoj tranoktis en tiaj subteraj dormejoj. En la urbo estis subtera templo kaj preskaŭ ĉiuj familioj havis teran altaron, el kio oni povas imagi, ke siatempe religio furoris en la loko. Ĉe la pordego de la urbo troviĝas profundaj maljunaj putoj. Laŭdire sub la tero kaŝiĝas kanalo 30 m longa, kiu eble interligas tiujn putojn...


Antaŭ 2.3 mil jaroj Cheshi-

## SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO









La ruina de Jiaohe



anoj vivis sude kaj norde de Tian-shan-montaro. Ili, lertaj en ark-pafado, aŭ paŝtis brutojn aŭ kulturis teron. En la 2-a jc a.K. ili dividis sian regnon en kelkajn partojn laŭ geografia situo. Jiaohé estis la ĉefurbo de la regno Cheshi. Meze de la 5-a jc malamikoj atakis ĝin, sed pro ĝia fortikeco ili uzis 8 jarojn por konkeri ĝin.

La regno Cheshi malaperis antaŭ tre tre longe, tamen ĝia ruino ankoraŭ imponas hodiaŭ.

## GAOCHANGBI

En la 1-a jc a.K., kiam hunoj regis la Okcidentan Regionon, la Silka Vojo malviglis. Por la sekureco de la Silka Vojo la kortego de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) garnizonigis armeon en la regiono kaj konstruigis tie urbon por gvidi terkulturadon kaj provianta la armeon. Tiu urbo

kaj sincere petis lin resti en la urbo, promesante, ke ĉiuj regnantoj fariĝos liaj disĉiploj kaj servos al li dum lia tuta vivo. Sed la bonzo nur konsentis prediki unu monaton en la urbo. Tie ni vizitis la ruinon de la halo, en kiu predikis la bonzo. Lokanoj diris, ke ĉiufoje, antaŭ ol la bonzo faris predikadon, la reĝo kun incenso bonvenigis lin al la halo kaj genuiĝis antaŭ la publiko, por ke la bonzo paŝu sur lia dorso por atingi la predikseĝon. Kiam la bonzo adiaŭis la regnon, la reĝo donacis al li 30 frokojn, 100 taelojn da oro, 30 ĉevalojn kaj 25 servistojn kaj skribis 24 leterojn ĉiu kun silkaĵo kiel donaco al la reĝoj de 24 regnoj, petante ilin doni oportunon al la bonzo por lia trapaso de la regnoj.

Zhang Xiong, kuzo de la reĝo, batalis 6 jarojn por defendi la Silkan Vojon. En la eksponejo de

tiamaj Gaochangbi-aj regantoj kaj popolanoj. La tombejo estas rigardata kiel subtera arkivo de la historio de Gaochangbi. Sur la plafono de multaj tombokavoj estas silka bildo kun figuroj de dio Fuxi kaj diino Nüwa. Legendo diras, ke ili estas prapatroj de la ĉina nacio. La bildo figuras, ke ili, ĉirkaŭitaj de la suno, luno kaj steloj, havas homan supran korpoparton kaj drakan malsupran korpoparton kunvolvitan, kio signifas, ke la kuniĝo de *jīn* (femalo) kaj *jiāng* (masklo) naskas homojn kaj ĉiujn aliajn estaĵojn. Tia adoro al la gedioj estis enkondukita de generaloj kaj soldatoj el centra Ĉinio.

## ŜTONKAVERNARO BOZKLIK

En la Okcidenta Regiono troviĝas ankaŭ multaj ŝtonkavernaj temploj. Unu el ili estas Ŝtonkavernaro Bozklik. Sin kaŝante en la Flamo-monto, ĝi servis kiel spirita hejmo de la antikvaj Gaochangbi-anoj, sed jam de tre longe al ĝi mankas bonzoj kaj pilgrimantoj.

Meze de la 9-a jc huihu-oj el stepo en norda Ĉinio fariĝis regantoj de Gaochangbi. Ili estis prapatroj de la uĝuroj kaj kredis je maniĥeismo. Ili faris maniĥeismajn kavernojn najbare de Ŝtonkavernaro Bozklik, kiun Gaochangbi-anoj faris je 300 jaroj pli frue. Poste la reĝo petis persajn maniĥeanojn fari predikadon, komprenigante, ke maniĥeanoj devas bonfari kaj bonfarantoj leviĝos al paradizo post morto... Tiam maniĥeismo fariĝis la regna religio kaj Gaochangbi — centro de maniĥeismo de la mondo.

Tamen 100 jarojn poste la reĝo de la regno Huihu konvertiĝis al la budhismo, ŝanĝis maniĥeismajn kavernojn en la budhismajn kaj transformis la milbudhan ŝtonkavernaron en templon de reĝa familio. Post tio aperis fresko pri kulto de reĝo kaj reĝedzino al Budho, kiu montras la reĝon portantan robon kaj botojn, kun tranĉi-



Ĉe ruino de antikva urbo

portis la nomon Gaochangbi.

En la 7-a jc ĝi fariĝis ĉefurbo, en kiu loĝis reĝo kredanta je budhismo. Kiam bonzo Xuanzang de Tang-dinastio (618-907), kiu okcidenten vojaĝis por peti sutrojn, estis preterpasanta la lokon, la reĝo bonvenigis lin per kandeloj antaŭ la pordego de la urbo

antikvaj kadavroj en Urumqi ni vidis lian kadavron, kvankam sekan, kun dikmuskola brusto, densaj barbo kaj haroj, tre similan al kupra statuo.

La kadavroj de Zhang Xiong kaj aliaj prauloj de Gaochangbi estas bone konservitaj en la Astana Tombejo apartenanta al la

lo, silikfajrilo kaj kudrilujo ĉe la talio. Kaj la tiamaj popolanoj ŝatis arope viziti en printempo templojn en montaro kaj rajdante arkpafion en signo forpeli ĉiajn malbonojn.

Ĉe la fino de la 13-a jc, sekve de prosperiĝo de islamismo en Gaochangbi la milbudha ŝtonkavernaro iom post iom dezertiĝis. Kiam ni vizitis ĝin, en ĝi restis tre malmultaj freskoj. La prosperiĝo kaj dekadenco de la ŝtonkavernaro montras, ke sur la antikva Silka Vojo diversaj kulturoj kaj kunfandiĝis kaj koliziis. Iuj daŭre vivis kaj aliaj pereis.

## ŜTONKAVERNARO KEZIR

Kuqa (Kuĉa), je 700 km okcidente de Turpan, estis sidejo de la antikva regno Qiuci (Ĉiŭci). Ĝi troviĝis meze de la Silka Vojo. Kiam budhismo enkondukiĝis de okcidento, oni komencis fosi tie ŝtonkavernojn kaj tiu konstruado disvastiĝis orienten ĝis centra Ĉinio. La startpunkto estis la 1700-jara Ŝtonkavernaro Kezir sur la krutaĵo norde de Qiuci. En ĝiaj 236 kavernoj estas freskoj sume de 10 mil kvadrataj metroj.

Kompare kun la budhofiguroj sur freskoj de Dunhuang, tiuj de Qiuci estas multe malpli dikaj. Laŭdire, antaŭ budhiĝo Ŝakjamunio asketis, manĝante herbojn kaj nur unu rizgrajnon ĉiutage, kaj maldikiĝis kiel skeleto. Tiel la malsata budho fariĝis idolo de budhistoj. Dancantaj hindaj bodisatvoj kun pufaj mamoj kaj gracia talio montriĝas en freskoj de la ŝtonkavernaro de Qiuci. Laŭdire, ili kunfandis arton de Grekio kaj ĝainismon de Hindio. Ankaŭ ĝainismo, kiu naskiĝis kune kun budhismo en la sama tempo, pledis por asketismo, kaj unu el ĝiaj sektoj opiniis, ke nur post kiam oni komplete forlasas siajn propraĵojn, lia animo povas saviĝi. Tial tiu sekto rigardis ĉielon kiel veston... La freskoj rakontas, kiel tiu sekto konvertiĝis al budhismo.


Dank' al la revigliĝo de la Silka Vojo, en Qiuci prosperiĝis

agrikulturo, komerco kaj metiindustrio. Tion figuras freskoj: komercistoj kune kun siaj ĉevaloj ŝarĝitaj per varoj foren veturas per draka ŝipo; kamparanoj plugas per bovoj; fajencistoj sidantaj surtere faras fajencaĵojn... Ĉio tio havas intimajn rilatojn kun la kulturo de centra Ĉinio.

Antaŭ pli ol 2 mil jaroj la reĝo de la regno Qiuci havis amikajn rilatojn kun Han-dinastio. Tiam Xieyou (Ŝjejoŭ), princino de Han-dinastio, edziniĝis al la reĝo de regno Wusun en la Okcidenta Regiono. Poste la reĝo de la regno Qiuci petis la manon de ŝia filino. Post sia edziĝo li plurfoje vojaĝis al centra Ĉinio por montri sian respekton al la imperiestro. Reveninte, li ekportis vestojn de han-oj, konstruigis palacon en han-a stilo kaj importis la ceremonion de Han-dinastio.

Dank' al lia malferma politiko, Qiuci fariĝis prospera internacia merkato de silkaĵoj. En Qiuci kolektiĝis diverslandaj komercistoj. Sogdoj el centra Azio eĉ stariĝis tie sian propran vilaĝon. Historia libro notas, ke sogdoj manĝis mielon al sia filo post lia naskiĝo kaj enmanigis al li gluajon, dezirante ke li parolu dolĉe kaj konservu monon bone, post kiam li fariĝos komercisto. Knabo eklernis skribi en la aĝo de 5 jaroj, kaj kiam li sciis legi


## Antikva pagodo en Turpan



kelkajn vortojn, oni lernigis al li komercon. Tial, sogdoj estis lertaj en komerco. Kiel perantoj tre spertaj, ili viglis eĉ en malproksimo.


Kiel regno de muziko kaj danco, Qiuci renomiĝis en la Okcidenta Regiono. Tie famis muzika familio, kiu instruis en ĉiu generacio al diverslandaj komercistoj ludi Qiuci-ajn muzikilojn. En la ŝtonkavernaro troviĝas bildoj kun figuroj de alilandanoj kantantaj kaj dancantaj. Ili ludas aŭ blovinstrumentojn de centra Ĉinio aŭ 5-kordajn instrumentojn de Hindio aŭ bivojn de Persio. Ĝuste en tiu periodo la Qiuci-aj muziko kaj danco atingis la kulminon de sia disvolviĝo. Bonzo Xuanzang vojaĝinta en pli ol 150 regnoj diris: "La Qiuci-a muziko ludata per blovkaj kordinstrumentoj plaĉas al ĉiuj regnoj." Antaŭ 1.5 mil jaroj Qiucia muziko estis enkondukita en centran Ĉinion kaj vaste ŝatata. Laŭdire ĉiuj, kiuj aŭdis tiun sonorajn kaj patosan muzikon, tiel ekcitiĝis, ke ili saltis, piedfrapis, klakis per la fingroj, balancis la kapon... Tiu vigla danco montriĝas en freskoj de la ŝtonkavernaro.

Same kiel la muziko kaj danco de Qiuci, ankaŭ ĝia ŝtonkaverna arto montris la saĝecon de diverslandaj artistoj. En la kaverno n-ro 207 estas bildo: 2 viroj kun longaj haroj pendantaj malsupren ĝis la ŝultroj, tenante kolorilon en unu mano kaj penikon en la alia, faras pentradon, starante sur la piedpintoj. Sub iliaj piedoj estas la nomo de hinda pentristo en la Qiuci-a lingvo. Kaj ĉe fresko en alia kaverno skribiĝas, ke pentristo el Sirio faris koloran cirkon kiel signon, fininte tiun bildon. ■



Alilandaj turistoj en antikva urbo







Fresko pri bodisatvoj

Unu el la ŝtonkavernoj de Kezir





Bildo pri funebrantaj reĝidoj



Bildo kun figuroj de dio  
Fuxi kaj diino Nüwa



Fresko pri geedziĝo

# Aŭtomobilo amortizebla

de JI PING

**L**ASTASOMERE en Pekino aŭtomobilo kaj klimatisilo havis grandan debiton. Kial la merkato de aŭtomobiloj estis tiel vigla? Ĉar aŭtomobiloj estis amortizeblaj en kelkaj jaroj.

Post laboro s-ro Shen tuj venis antaŭpago 8 800 juanojn por aŭtomobilo, kaj la restajn li pagos en tri jaroj. "Mi volis aĉeti aŭtomobilon antaŭ longa tempo, mi venis ĉi tien kelkfoje," s-ro Shen diris. La malgranda aŭtomobilo, kiun li aĉetis, kostas 60 mil juanojn. "Poste ĉiumonate vi multe pagos, ĉu tio ne influos vian vivon?" mi demandis lin. Li senhezite respondis: "Ne." Gesinjoroj Shen, laborantaj en kompanio, enspezas kompare multe en Pekino. Li diris, ke li ne havas sufi-

estas ordinara, sed en Ĉinio tio estas nova fenomeno. Ĉinoj estas konservativaj en konsumado, ili emas elspezi kiom ili havas, eĉ ŝparas iom da mono por eventuala uzo. Se amortizo signifas "uzi havotan monon", do ĉinoj plikutimas uzi "havitatan monon". Unuflanke por ĉinoj amortizo estas nova koncepto de konsumo. Aliflanke amortizo estas surbaze de kompare stabila enspezo. Laŭ la nuna konsumata situacio, tiuj, kiuj enspezas 35-50 mil juanojn jare, povas elteni amortizon. Sed mal multe da homoj havas tian enspezon. Kompreneble, oni konsideras ankaŭ aliajn punktojn. En la foirejo de aŭtomobiloj mi renkontis s-ron Li.

S-ro Li kaj lia filo venis de antaŭurbo. Ili rigardadis iun aŭton, sed ne povis decidi ĉu aĉeti aŭ ne. S-ro Li diris, ke li, komercisto, bezonas aŭton. Sed post kalkulado li rimarkis ke amortizo, pli multepagiga ol unufoja pago je 8-9 mil juanoj, ne taŭgas por li. Li hezitis longe kaj foriris kun bedaŭro.

Pro amortizo la aŭtomobila merkato certe ekscitis

aŭtomobilajn entreprenojn. S-ro Shan, ĉefo de iu aŭtomobila foirejo, diris al mi, prenante aŭton kun marko "Alto" kiel ekzemplon, ke antaŭe ĉiumonate en ĉefsezono oni vendis malpli ol 100 aŭtomobilojn, sed nun en dekelkaj tagoj 300

aŭtomobiloj estas amortizitaj. Komence sukcesis nur kelkaj mezgrandaj entreprenoj, kiuj produktas malluksajn personaŭtojn. Iliaj sukcesoj interesis grandajn entreprenojn, kiuj produktas mezlüksajn aŭtomobilojn. La Unua Aŭtomobila Fabrikado, unu el la grandaj aŭtomobilaj entreprenoj de Ĉinio, ne rifuzas amortizon, sed opinias ke financa departemento kaj banko devas aliĝi al la amortizo, alie amortizo nur estas aktivado de entreprenoj, ne havas veran sencan, samtempe respondeco de entreprenoj por risko kaj ŝarĝo estas tro peza. Alia aŭtomobila entreprenoj opinias, ke se ĝi atendas ĝis kondiĉo de amortizo maturiĝos, eble ĝi ne havos ŝancon.

Nun la aŭtomobila merkato de Pekino havas tri klasojn de amortizmanieroj. S-ro Shan diris, ke s-ro Shen elektis la plej malaltan klason. Plejparto de la klientoj elektas la mezan. Ili antaŭpagas pli multe kaj tute pagos en du jaroj. Ĉu oni povas pagi en pli longa tempo aŭ ne? S-ro Shan respondis: "Jes, sed tio estas sensignifa." Ĉar amortizitaj aŭtomobiloj ne estas multekostaj, pli longa jaro signifas pli multe da interezo.

Pri garantio s-ro Shan diris, ke krom necesaj atestoj, oni postulas ankaŭ la jenon: unue, familia garantio, geedzoj, patro kaj filo, gefratoj fariĝas kunaĉetantoj, kio favoras al aĉeto; due, se aĉetanto ne povas pagi laŭ interkonsento, li havas tempolimon de du monatoj longigitan, sed post du monatoj, por unu tago li devas pagi 200 juanojn; trie, se aĉetanto okaze ne povas pagi, la aŭtomobilo fariĝos hipotekaĵo. Kompreneble, la plej baza kaj efika garantio estas leĝo, ankaŭ asekura kompanio helpas.



Foirejo de aŭtoj en Pekino

ĉe da mono por aĉeti domon, kaj malfacilas por li unufoje pagi 60-70 mil juanojn por aŭtomobilo, nun post antaŭpago li povas uzi la aŭtomobilon, do li sentas sin trankvile.

En multaj landoj amortizo



**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Interpretistetoj de KEMING Scienca Saĝa Esperanta Angla-lingva Klubo (SSK) dez. kor. Esperante, angle, ruse, ĉine k.a. kun lernantoj de la mondo pri lingvo, muziko, poemo kaj aliaj temoj. Adr.: 228 Scienca Halo, 171 Lianxin Lu, Guangzhou CN-510040, Ĉinio.

\* Guan Jingshan, 11-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, fremdaj lingvoj, pianludo, naĝo kaj filatelo. Adr.: 10-302, Poŝto 19, 24 Huanghua Lu, Guangzhou, CN-510050, Ĉinio.

\* Yuan Mingxin, 13-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, angla lingvo, pentraĵo kaj danco. Adr.: 21-801, Keshan 9 st. Guangzhou, CN-510010, Ĉinio.

\* Xie Ying, 13-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, angla lingvo, pianludo, naĝo, sketado, kanto kaj danco. Adr.: 21-401, Keshan 2 st. Huanshi Xi Lu, Guangzhou, CN-510010, Ĉinio.

\* Chen Pu, 12-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, filatelo, naĝo kaj aliaj sportoj, televidaj programeroj kaj elektro-kordinstrumento. Adr.: E 2 Zuo, 02 Teretaĝo, Wuyang Cun, Dongshan, Guangzhou, CN-510060, Ĉinio.

\* Peng Zhenni, 13-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, filatelo, kanto kaj danco. Adr.: 18-101, Xi Zhan 3 st. Huanshi Xi Lu, Guangzhou, CN-510160, Ĉinio.

\* Xia Xinxin, 13-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, angla lingvo, pentraĵo, muziko, kanto kaj danco. Adr.: 23-101, Kanggongzhi, Dongshanfang, Longjin Dong Lu, Guangzhou, CN-510180, Ĉinio.

\* Lin Pin, 14-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, pentraĵo, sporto, muziko, legado kaj turismo. Adr.: 84-602, Huayi Ĝardeno, Chigang Dong Lu, Haizhu, Guangzhou, CN-510310, Ĉinio.

\* Zhan Wenjing, 14-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, danco, kanto, legado, sporto kaj filatelo. Adr.: Ju Yi Tang, 34 Teretaĝo, Tianliao Gudao st. Daihe Lu, Liwan, Guangzhou, CN-510140, Ĉinio.

\* Lin Shengnan, 15-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, komputero, ŝako, filatelo, kaligrafio k.a. Adr.: 21 Shangjiu Lu, Liwan, Guangzhou, CN-510140, Ĉinio.

\* Xie Jieling, 13-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, muziko, kanto, pentraĵo kaj angla lingvo. Adr.: 8-307, Shanwai St. Nan'an Lu, Xichang, Liwan, Guangzhou, CN-510160, Ĉinio.

\* Wang Mengyuan, 12-j. lernantino, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la

mondo pri lernado, fremdaj lingvoj, kanto, komputero, filatelo kaj sporto. Adr.: 10-201, Xiatang Xin Cun, Tianhe, Guangzhou, CN-510091, Ĉinio.

\* You Fan, 13-j. lernanto, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, pentraĵo, naĝo kaj danco. Adr.: 17-501, Tiyu Xi Heng st. Tianhe, Guangzhou, CN-510620, Ĉinio.

\* Zhou Zhihui, 12-j. lernanto, dez. kor. angle, Esperante kaj ĉine kun lernantoj el la mondo pri lernado, fremdaj lingvoj, ĉina ŝako, sporto, geografio, astronomio. Adr.: 6-5-711, Huanghua Lu, Guangzhou, CN-510050, Ĉinio.

\* Mario L. RUIZ KARELL, 35-jara sporto-instruisto, dez. kor. tutmonde, speciale kun kuvajtiano, interesiĝas pri bildokartoj, Esperantaj kaj sportaj pm., monbiletoj, moneroj, muziko kaj sporto. Adr.: Apartado 14012, Mnao. 14, Co. de la Habana, 11400, Havano, Kubo.

\* Ramon Molera, 11-j. knabo, interŝanĝas pm. pri sportoj kaj bestoj. Adr.: C/Nord, 49-casa 62-ES-08950, Esplugues de Llobregat, Hispanio.

\* Zbigniew Siekierski, 42-j., serĉas lerteramikojn pri fotado, vojaĝo, turismo, historio, antikvaĵoj, kasteloj, moroj kaj kutimoj de aliaj nacioj, legendoj ktp, kolektas Esperantaĵojn, gvidlibrojn, albumlibrojn, lumbildojn, diapozitivojn k.a. Adr.: ul. Sadkowska 13m. 8. PL 26-600 Radom, Pollando.

\* 16-j. bulgara lernantino dez. kor. pri literaturo, sporto kaj belarto kaj interŝanĝas bildkartojn. Adr.: Petja Garalova, Str. Hristo Smirnenki N-ro 11, 4640 Baki-tovo, Bulgario.

Laŭ statistiko de koncerna departemento, en 1984 ĉinaj familioj aĉetis 173.5 mil aŭtomobilojn, ĝis la fino de 1995 la sumo

kreskis al 2.5 milionoj. Por 1.2 miliardoj da ĉinoj, tio estas malgranda sumo, kaj dum longa tempo aŭtomobilo ankoraŭ ne estos

necesaĵo por ĉinoj, ĝi estas nur longjara revo. Amortizo ne povas ŝanĝi la fakton, tamen povas pli frue realigi la revon. ■





En vendejo de elektraj aparatoj kun marko Haier

# Haier strebas

de JI PING

**H**AIER estas fama marko en merkato de elektraj aparatoj de Ĉinio. La fridujo, lavmaŝino, klimatizilo k.a. kun marko Haier havas grandan debiton. Ja estas vere, ke la varoj markitaj per Haier estas bonkvalitaj.

Sed antaŭ 10 jaroj la entrepreno situanta ĉe la Flava Maro estis malgranda fabriko suferanta de grava deficito. En 1984 s-ro Zhang Ruimin fariĝis ĝia estro. Li okazigis ekspozicion de ĝiaj 76 malbonkvalitaj fridujoj. Post

kiam la laboristoj ilin rigardis, Zhang kategorie decidis detruĝi ilin.

Kiam la 76 fridujoj skoriĝis, la laboristoj de Haier faris la unuan paŝon survoje al famigo de siaj varoj. En 1988 la fridujo Haier gajnis oran medalon de bonkvalita varo de Ĉinio. En 1996 ĝi gajnis la premion "Kvin-stela Diamanto" de Usono. Dank' al rigora kontrolo de la kvalito, Haier finfine ekhavis lokon en la merkato. Preskaŭ samtempe Haier aneksis plurajn deficitajn entreprenojn kaj enkondukis avangardan alilandan teknologion. Dank' al tio ĝiaj varoj ekhavis

## KURANTAJ AFEROJ

- La 29-an de okt. 1997, oni sukcese digis la Flavan Riveron ĉe Xiaolangdi en la meza parto de la provinco Henan.

La akvoutiliga konstruo Xiaolangdi estas ŝlosila por reguligi la Flavan Riveron en la plej taŭga loko. Tie la akvokonservejo estas granda. Ĝi estas utila al 93% de la baseno de la rivero en la batalo kontraŭ inundo kaj trosekeco. Kaj krome, ĝi estas utila ankaŭ al redukto de ŝlimado, al irigacio, livero de akvo, produktado de elektro k.a. Laŭ plano la akvoutiliga konstruo Xiaolangdi estos finkonstruita en 2001.

- La Lanzhou-Xining-Lhasa-a telekomunika fotokablo 2 739 km longa estas komplete sternita, tra la provincoj Gansu kaj Qinghai kaj la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Ĝi etendiĝas tra lokoj kun meznombra alteco de 4 000 m super la marnivelo, inkl. de Qaidam-baseno, la montaroj

# por mondfamiĝo

unuarangan kvaliton jam de tiam. Kaj iom post iom ĝi disvolviĝis en grandan korporacion, kiu povas produkti elektrajn aparatojn de 10 specoj kun 5 000 normoj, inkl. de fridujo, lavmaŝino, mikroonda forno k.a. Nun ĝi estas la plej granda korporacio el la ĉinaj entreprenoj de hejmaj elektraj aparatoj. Ĝiaj eksportaĵoj okupas la unuan lokon inter tiuj de la samspecaj entreprenoj de Ĉinio.

Samkiel aliaj potencaj entreprenoj, ankaŭ Haier energie laboras por sin montri en la internacia merkato. Tamen en la unua

fojo, kiam ĝiaj fridujoj eksportiĝis en Germanion, pro ilia nekonateco oni tenis sin apatie kontraŭ ili en la vendejoj. Tiam ĉinaj entreprenistoj petis la germanan komerciston deŝiri la markon kaj miksi la fridujojn Haier kun aliaj samspecaj varoj, por ke la klientoj mem elektu, rezulte oni mendis 20 000 fridujojn de Haier. Post tio la produktaĵoj de Haier facile eksportiĝis en Usonon, Francion, Germanion, Japanion kaj aliajn landojn.

Samtempe kun tio, ke la varoj de Haier vendiĝas en la internacia merkato, la korporacio Haier

sukcesis ankaŭ en entreprenado en alia regiono aŭ lando. En 1995 naskiĝis Hongkong-a kompanio de Haier. Dank' al la tieaj favoraj kondiĉoj financaj kaj komercaj, Haier bone utiligas sian kapitalon kaj disvolvas importadon kaj eksportadon de varoj. En 1996 ekfunkciis la indonezia kompanio de Haier, kies jara produktokvanto estis 100 000 fridujoj. En 1997 Haier faris kontraktojn pri starigo de fabrikoj investotaj de ĝi kaj Malajzio kaj de ĝi kaj Filipinoj. Pro tio Haier faris pli grandan paŝon sur la vojo al sia famiĝo en la internacia merkato. ■

Kunlun kaj Tanggula. La kablo multe utilas al la telekomunikado en nordokcidenta kaj sudokcidenta Ĉinio.

● Dank' al 10-jara esplorado la hektara produktokvanto de la nova vario de sojfabo "Hefeng 25" elkulturita de Ĉinio atingis 2 250 kg. kaj krome, la vario estas forta en rezisto kontraŭ malsanoj kaj naturaj katastrofoj. Alilandaj fakuloj multe laŭdis tiun sciencan frukton. Nun tiu vario kreskas sur 10 milionoj da hektaroj en Ĉinio.

● En 1996 la nombro de la registritaj individuaj industriaj kaj komercaj entreprenistoj en Ĉinio estis 27 milionoj, kaj tiu de privataj entreprenoj — 0.81 miliono kun 61 milionoj da laborantoj, kiuj konsistigas 10% de la tutlandaj laborantoj.

● Ekde la 1-a de okt. 1997 Ĉinio refoje malaltigis doganon, averaĝe de 23% al 17%. La dogan-tarifo koncernas 4 800 specojn da varoj.

# Debato kaj interŝanĝo

*Debato estas speciala fenomeno en pensado kaj lingvo de la homaro. Ĝi aperis antike kaj havas vivecon ankaŭ en la moderna mondo. Filozofoj de la antikva Grekio kaj ĉinaj intelektuloj en la epoko antaŭ Qin-dinastio (221 a.K. - 206 a.K.), ĉiuj per sia talento de debato kontribuis al la evoluo de la homa civilizacio. En 1997 okazis en Singapuro la Tria Internacia Debato-konkurso (Ĉinlingva) inter Universitatoj. Studentoj el universitatoj de 8 landoj kaj regionoj debatis pri kelkaj temoj. La teamo de la Ĉefurba Normala Universitato (ĈNU) el Pekino gajnis la 2-an lokon en la konkurso. Ili revenis kun neforgesebla impresio.*

Yu Tao

## ŜI LERNIS BONE KONDUTI

Cui Weijun (Cuj Ŭejĝjun) estis la unua debatanto de ĈNU-teamo. En la konkurso, kiel la unua parolanto, ŝi fundamentis la argumenton de la tuta teamo. Ŝiaj vortoj ofte vekis admiron de la aŭskultantoj. Loka ĵurnalo laŭdis ŝin, ke ŝia temperamento estas plej bona. Post la konkurso la Ĉina Centra Televido projekciis videobendon pri la konkurso al la tuta lando kaj vekis grandan eĥon de la spektantoj. Nun ŝia svelta figuro denove kuniĝis kun la studentoj de ĈNU, kvazaŭ ŝi forgesus, ke kiel debatanto-stelo ŝi estis konata de sennombraj spektantoj.

Retrorigardante la debat-konkurson, Cui diris, ke ŝia plej granda rikolto estas lerni bone konduti.

Fine de junio de 1997, ĈNU ricevis inviton al la konkurso. La universitato afiŝe varbis debatantojn inter la studentoj. Venis multaj

kandidatoj. Post selektoj 10 gestudentoj elstariĝis. Cui kaj aliaj tri elektiĝis kiel membroj de la teamo, kaj la ceteraj iĝis helpantoj en ekzercado. Ĉi tiuj, sciante ke ili ne povas iri al Singapuro, tamen plenforte helpis la teamanojn dum la ekzercado. En intensa debatado kun la helpantoj, la teamanoj estis bone trejnataj kaj ankaŭ kortuŝitaj de ilia sindonemo.

Cui Weijun diris: "En la konkurso ni bone komprenas la valoron de la helpantoj. Multaj vortoj de niaj rivaloj estis uzitaj de la helpantoj dum ekzercado, tiel ni kun memfido estis tute pretaj. Krome, la konkurso instruis min, kiam mi devas cedi modeste kaj kiam mi devas malcedi por defendi nian argumenton. Mi lernis kiel bone konduti."

Fraŭlino Cui multe spertis en la debat-konkurso. Ŝi studas en la fakultato de politiko kaj juro kaj deziras iĝi advokato, ĉar ŝi trovis sian talenton de debato.



Antaŭ debat-konkurso

## LA PLEJ ELSTARA DEBATANTO

Wang Weiqing (Ŭang Ŭej-ĉing) kun okulvitroj ne estas alta. Kiel la tria debatanto de la teamo, li estis elektita kiel la plej elstara debatanto de la konkurso.

En la prepara konkurso ĈNU-teamo debatis kun universitato de Singapuro pri la temo "Ĉu la registaroj devas plene komplekse malpermesi fumadon?"; en duonfinalo ili debatis kun studentoj el Kanado pri la temo "Ĉu oni devas cenzuri la Interreton?"; kaj en la finalo ili debatis kun tiuj el Malajzio pri la temo "Ĉu ju pli oni debatas, des pli klaras la vero?". En tiuj tri konkursoj, Wang Weiqing, per siaj sagaco kaj humuro, ricevis laŭdon kaj admiron de la juĝantoj, spektantoj kaj eĉ la rivaloj.

Kvankam honorita kiel la plej elstara debatanto, Wang Weiqing tre bedaŭris la malvenkon en la finalo. Li klarigis: "Ĉar ni ne havis sufiĉe da tempo, ni bone preparis nin nur por la unuaj du konkursoj, precipe por la unua kontraŭ



la teamo de Singapuro, la gastiganto de la konkurso. Sed por la finalo ni ne estas tute pretaj. Tagon antaŭ la finalo, aliaj teamoj turisme vizitis la urbon, kaj ni devis nin prepari en la hotelo. Se ni pli bone preparus nin, ni gajnus la ĉampionecon.”

Tiam li estis studento en la tria klaso de la fakultato de historio. Nun en la lasta semestro li praktike instruas en mezlernejo. La lernantoj tre emociiĝis, kiam ili vidis la debato-stelon, kiu oratoris sur televidila ekrano, stari sur la podio por doni al ili lecionon. Wang Weiqing ne volas multe paroli pri la debat-konkurso, ĉar lia tasko nun estas instrui historion. Tamen la lernantoj pliproksimiĝas al li dum babilado pri la konkurso kaj debato.

## ĈINLINGVA DEBAT-KONKURSO

La ĉinlingva debat-konkurso aperis en Singapuro en la 60-aj jaroj. Nun ĝi havas fiksan modelon: lotado decidas pri la pledo

de du teamoj, kiuj konsistas el po 4 anoj; alterne parolas la unuaj tri debatantoj de ambaŭ teamoj, sekvas libera debato, en kiu alterne parolas ajnaj anoj de ambaŭ flankoj; fine la 4-a debatanto de ambaŭ flankoj konkludas sian argumenton. La rezulton decidas juĝantaro el kelkaj ĉinlingvaj fakuloj.

Tia debat-konkurso furoras en Singapuro. En 1986 okazis la Unua Azia Debat-konkurso (Ĉinlingva) inter Universitatoj, kaj la teamo de la Pekina Universitato gajnis la ĉampionecon; en la finalo de la Dua Konkurso en 1988, Fudan-universitato de Ŝanhajo venkis Taiwan-universitaton; kaj en 1990 Taiwan-universitato leviĝis kaj okupis la unuan lokon.

Kun la celo “vidigi la belecon kaj fascinadon de la ĉina lingvo, disvastigi kaj utiligi la ĉinan lingvon”, en 1993 la Ĉina Centra Televido kaj Singapura Televido kune organizis en Singapuro la Unuan Internacian Debat-konkurson (Ĉinlingva) inter Universitatoj. Multaj studentoj ne-ĉindeve-

naj estis invititaj, tio puŝis la ĉinlingvan debat-konkurson en pli ampleksan kampon. Fudan-universitato refoje ĉampioniĝis. Ilia sukceso vekis grandan eĥon en Ĉinio kaj levis tajdon de debato en la universitatoj.

En 1994 okazis debat-konkurso inter ĉinaj universitatoj. La Nankina Universitato venkis kaj kiel reprezentanto de la ĉinaj universitatoj partoprenis la Duan Internacian Debat-konkurson en 1995 en Pekino. Ĝiaj 4 studentoj fine gajnis la ĉampionan pokalon. Ĝuis la oratorecon de junaj studentoj milionoj da televidspektantoj, junaj kaj maljunaj. Fama ĉina intelektulo diris: “Je la fino de la 20-a jarcento, en Ĉinio eĉ milionoj da televidspektantoj ŝatos tian debat-konkurson, ĉar la debatantoj ne kiel pensuloj de la antikva Ĉinio havas definitivan politikan ambicion, nek kiel oratoroj de la antikva Grekio havas profundan filozofian celon, ili simple deziras montri al la publiko la manieron kaj sistemon juste kaj racie esprimi sian opinion antaŭ la rivaloj.”

## AMIKECO KAJ INTERŜANĜO

Por ĉinaj studentoj, kiuj prenis la ĉinan lingvon kiel patran lingvon, la debat-konkurso estas ŝanco montri ideon; kaj por tiuj neĉinaj studentoj el Koreio, Eŭropo aŭ Ameriko, ĝi estas maniero lerni la lingvon kaj studi la kulturon de Ĉinio.

La 4 gestudentoj el la Instituto de Orientaj Lingvoj de Francio parolas la ĉinan lingvon ne rapide, sed klare kaj humure. En la konkur-



Li Xuexia, Wang Weiqing, Wang Yanhong kaj Cui Weijun (de maldekstre) en debat-konkurso

so iu studentino el ili stariĝis, sed ne tuj refutis la alian teamon, dirante: “La parolo de nia rivalo estas ĝusta, kaj mi tute aprobas, sed mi venis por debati, do permesu al mi refuti.” Ilia humuro donis iom da leĝereco kaj vigleco al la streĉa konkurso.

La 4 gestudentoj el ĈNU akiris admiron per oratoreco en la konkurso, kaj en libera tempo ili amikiĝis kun la spektantoj kaj aliaj studentoj. La 2-a debatanto de ĈNU-teamo, fraŭlino Wang Yanhong, estis laŭdata pro plej dolĉa voĉo. En paŭzo de la konkurso ŝi prezentis ĉinan kanton, kiu memorigis ŝian belan voĉon al la aŭskultantoj. La 4-a debatanto, fraŭlino Li Xuexia (Li Ŝjueŝja) estis taksata de loka ĵurnalo kiel plej firmvola. En libera tempo, ŝi kaj Cui multe babilis kun alilandaj studentoj — kun francaj amikoj pri “Ruĝdoma Songô” (ĉina klasika romano), pri kino de Francio. Antaŭe, ili apenaŭ havis tian ŝancon babili kun alilandaj studentoj.

Antaŭvesperon de ilia reveno al la patrujo, studentoj el Singapuro kaj Koreio venis al ĉambro de ĈNU-studentoj. Ili tutan nokton babilis pri Pekino: Chang’an-strato, trefkruciĝaj aŭtovojoj, brilaj aŭto-fluoj sur la Tria Ĉirkaŭurba Strato nokte...

Nun Wang Weiqing kaj aliaj revenis al sia universitato, kiu situas apud la Tria Ĉirkaŭurba Strato de Pekino. Ili revidis la brilajn aŭto-fluojn. La vivo iom ŝanĝiĝis — de tempo al tempo ili ricevis leterojn de studentoj alilandaj aŭ spektantoj singapuraj, kiuj rememorigis ilin pri la tagoj de debat-konkursoj. ■

## FOSILIO DE GIGANTA RINOCERO TROVITA EN XINJIANG

Konstruante fervojon en Xinjiang, oni trovis nombron da fosilioj, inter kiuj estas kompleta fosilia skeleto de giganta rinocero ĉ. 12 m longa kaj 4 m alta kaj fosiliaj fragmentoj de testudoj kaj ĥelonioj. Arkeologoj opiniis, ke tio estas unu el la plej grandaj kaj plej kompletaj specimenoj de gigantaj rinoceroj, jam trovitaj en la mondo. La eltrovo de la fosilia skeleto povas servi kiel valora materialo por studi paleontologion, paleogeografion kaj paleoklimatologion de la terciara epoko.

Giganta rinocero estis herbivora besto, vivanta kune kun testudoj, ĥelonioj kaj fiŝoj. Ĝia eltrovo atestas, ke antaŭ 70-23 milionoj da jaroj la ekologia medio de Xinjiang estis tute malsama ol la hodiaŭa. Imageble, tie estis senlima lago kun malseka klimato, kreskis densaj arbaroj kaj abundaj herboj. Formiĝo de Himalajo pereigis gigantajn rinocerojn kaj aliajn

bestojn.

La riparita fosilio de giganta rinocero estas eksponata en la muzeo de Turpan, Xinjiang.

## NUO-OPERO

Nuo-opero ludata kun maskoj aperis en la antikveco kaj nun furoras en la sudorienta parto de Sichuan-provinco. Ĝi estas nomata “viva fosilio” de la ĉinaj operoj.

La melodio de nuo-opero estas kruda, tamen ĝi konservas ritmon de popolaj operoj. Nuo-opero de Qianjiang-subprovinco de Sichuan portas fortajn religiajn kolorojn, ĉar ĝi devenis de ekzorcadado.

Ludantoj de nuo-opero plejparte estas kamparanoj. Dum ludado ili laŭvole kantas, legas, gestas kaj luktas. Dank’ al ilia laŭvoleco kaj naiveco en la prezentado, la opero estas tre ŝatata de vastaj popolamasoj.

Oni ludas nuo-operon ĉefe sur kampo, kaj la rigardantoj plejparte estas kamparanoj. Iafoje okazis, ke ludanto forgesis tekston kaj daŭrigis sian prezentadon helpate de rigardantoj. Kvankam nuo-opero estas primi-



Prezentado de nuo-opero

tiva kaj simpla, tamen ĝiaj maskoj estas vivecaj kaj esprimplena. En nuo-opero la maskoj markas la rolon. Antaŭ ludado la aktoroj devas kovri siajn buŝon, nazon kaj kapon per tuko kaj surmeti frokon kaj maskon laŭ sia rolo. La arkformaj maskoj surhavas gravuraĵojn kaj pentraĵojn, kun truo meze por faciligi rigardon. La roluloj devas plurfoje ŝanĝi sian maskon por adaptiĝi al intrigoj de la opero.

Maskoj de nuo-opero jam fariĝis artaĵo pro sia troigo kaj vigeleco. Vendiĝas tiaj maskoj en multaj turismaj vidindejoj de la provincoj Sichuan, Guizhou kaj Yunnan.

#### MIRINDA PATRINA AMO

Tio estas travivaĵo rakontita de ĉina laboristino:

Mia filino Dang Peipei estas 14-jara. Kiam mi estis naskonta ŝin, mi suferis akuŝmalfacilon dum kvin tagoj. Tiam mi havis nur unu ideon, ke se nur ŝi naskiĝos viva, mi nepre ameme kaj ĉiamaniere flegos ŝin.

En la aĝo de 3 jaroj ŝi ankoraŭ ne povis paroli kaj paŝis stumble. Preskaŭ ĉiumonate ŝi devis enhospitaliĝi. Tamen mi kredis, ke mia filino ne estos sentaŭga, sed utila al la socio.

Sano estas fundamento de kapableco. Mi ellaboris kaj efektivigis por mia filino rigoran planon: kurado, naĝado, sketado kaj montogrimpado. Kiam mia Peipei estis 5-jara, ni kune iris por montogrimpado. Tio estis vojo taŭga por mia filino kaj elektita de mi post multfoja grimpado. Duonvoje ŝi jam ne volis daŭrigi la grimpadon, tamen ŝi sciis, ke mi ne lasos ŝin ĉesi grimpi. Ŝi ploris: "Panjo, helpu min, mi petas, nur ĉi-foje." Por firmigi ŝian volon, mi diris kategorie: "Ne, neeble, Peipei,

vi nepre mem grimpu ĝis la supro." "Panjo, panjo...", mia filino kriis, suprengrimpadis kiel hundido, ŝiaj genuoj kaj manoj vundiĝis kaj sangis.

Ŝi fortiĝis tago post tago kaj ankaŭ ŝia volo ĉiam pli firmiĝis. Tamen ŝi alfrontis pli grandan malfacilon pro malalta intelekto. Mi do pli penige ekzercis ŝin, konsiderante ŝian ŝaton.

Foje, mia filino diris, ke ŝi ŝatas akordionon de la infanĝardeno. Mi aĉetis por ŝi malgrandan akordionon. Mi akompanis ŝin por lerni ludon de akordiono malgraŭ ventego kaj pluvo. Post kelka tempo ŝi evidente progresis.

Ŝi ekvizitis lernejon kaj mi tre ĝojis pro tio. Tamen post unu monato ŝia instruisto informis min: "Via filino ofte stumblis. En la leciono ŝi komprenis nenion. Konduku ŝin hejmen kaj ŝi lernu en la venonta jaro." Mi insiste petis kun larmoj: "Lasu ŝin lerni kelkajn monatojn. Se la infano ankoraŭ ne taŭgos, tiam mi kondukos ŝin hejmen." Mi kredis, ke penado ne malesperigas homon. Mi komencis lernigi ŝin pri fonetiko. Mi tondis kartonon en slipojn kaj skribis literojn sur ili. Ĉiumatene mi kondukis ŝin al strato, metis la slipojn teren kaj instruis ŝin elparoli. Mi per herbotigoj kaj ŝtonetoj trejniis ŝin por kalkulado. Post duonjaro ŝia intelekto evidente altiĝis. En la lernado ŝiaj poentoj leviĝis de 45 al 75-100. Krome, ŝi plurfoje estis anoncistino por arta prezento de element-kaj mezlernejoj de nia urbo, kaj estis elektita kiel elstara anoncistino. Foje post kunveno, oni ŝin demandis: "Dang Peipei, vi akiris tiom da sukcesoj, kio estas la motivo?" "Dang Peipei, kion vi volas diri antaŭ ĉio?" Mia filino kun larmoj diris nur: "Mi dankas mian patrinon! Mi dankas... mian

patrinon."

#### TIBET-NACIANOJ ĈE LA FONTO DE YANGZI-RIVERO

La neĝmonto Geladandong kaj la fonto de Yangzi-rivero estis ĉiam rigardataj kiel senhoma regiono. Tamen dum sia vizitado ĉinaj raportistoj neatendite trovis du tibetajn familiojn tie loĝantajn. La neĝmonto Geladandong 6 621 m super la marnivelo, kuŝanta en Qinghai-provinco, estas ĉefpinto de Tanggula-montaro. Ĉirkaŭe skrapas la ĉielon 20 neĝkovritaj montpintoj.

Tendoj de la du familioj estas tre proksimaj unu al la alia. La 44-jara mastro, staranta ekstere de sia tendo, enkondukis la gastojn. Li kun du longaj harligoj portas sur si tibetan ŝaffelan robon faritan de lia edzino. En la tendo li prenis plenmanon da ŝaflano kaj lerte tordis el ĝi fadenon. Lia edzino, 41-jara mastrino, regalis la gastojn per freŝa lakto kaj fromaĝo.

La dika masiva tapiŝo en la hejmo estis farita de la geedza paro kune (la edzo tordis fadenojn kaj la edzino teksis tapiŝon). Ili konigis, ke por fari tian tapiŝon ili bezonas 4 monatojn. La teksaj instrumentoj estas nur lignaj bastonetoj dikaj kaj maldikaj, longaj kaj mallongaj. Ankaŭ la botoj, kiujn ili portas, kun plandumoj el bovlado, dorsoj el ŝaflano kaj kru-ringoj el kordurojo, estis faritaj de la mastrino.

La mastrino de lia najbaro forpasis antaŭ 4 jaroj kaj la 16-jara filino prenis sur sin la mastrumadon. Ŝi vestas sian kapon per kvadrata kaptuko, vidigas nur siajn okulojn kaj nazon. Ŝi estas tre okupita pri la mastrumado. Vidinte, ke la raportistoj lavas siajn manojn per ŝaŭmsapo, ŝi scivole ridis.



**V**EJĈI-LUDO estas simpla kaj samtempe varia. La simpleco signifas, ke estas nur du specoj de ŝtonetoj de vejĉi-o, nigraj kaj blankaj, kaj je la fino de la ludo venkas tiu, kiu okupas pli multe da krucpunktoj. Kaj la varieco signifas, ke sur vejĉi-tabulo, formita el 19 horizontalaj kaj 19 vertikalaj linioj kaj havanta 361 krucpunktojn, varias dum ludo kombinoj de ŝtonetoj kiel astronomiaj ciferoj. Ĝuste pro tio, vejĉi-ludo estas tre interesa kaj amuza.

Dum pli ol trimil jaroj de sia disvolviĝo vejĉi-ludo estis spicita per aparta signifo kultura. Sekve, vejĉi-o kaj vejĉi-istoj ne estas ordinaraĵoj, kiel aliaj ŝakludoj kaj ŝakludistoj.

Je mencio pri vejĉi-o ĉinaj esperantistoj certe rememoras marŝalon Chen Yi. Kiam li funkciis kiel vicĉefministro kaj ministro de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio, li multe zorgis pri la ĉina Esperanto-movado kaj proponis, ke okazu UK en Pekino.

S-ro Chen Yi estis ne nur poeto, sed ankaŭ vejĉi-maniulo. Jam en sia knabeco Nie Weiping, kiu poste fariĝis eminenta vejĉi-isto de Ĉinio, komencis ludi vejĉi-on kun Chen Yi. Nun la ĉinaj vejĉi-istoj tre sopiras pri li, kiu forpasis en 1972. Oni skulptis la kupran buston de Chen Yi kaj metis ĝin meze de la vestiblo de la Ĉina Akademio de Vejĉi-o. Ŝajnas, ke kun krucitaj brakoj sur la brusto, li ankoraŭ fiksis sian rigardon sur vejĉi-tabulo. Lia devizo "Granda nacia forto prosperigas vejĉi-ludon" estas ĉiam en la memoro de la ĉinaj vejĉi-istoj kaj akcelas la disvolviĝon de la ĉina vejĉi-ludo.

Jam antaŭ Tang-dinastio (618-907) vejĉi-

LI LIANG:

## Disvolviĝo de la ĉina vejĉi-ludo

ludo estis enkondukita en Koreion kaj Japanion. Ĝis la fino de Qing-dinastio (1644-1911) Ĉinio estis la plej forta en vejĉi-ludo. Poste, pro malgrandiĝo de la nacia forto kaj oftigo de militoj Ĉinio perdis la avangardecon kaj Japanio superis ĝin.

En la 80-aj jaroj de la nuna jarcento revigliĝis la ĉina vejĉi-ludo. En 1985 komenciĝis la Defia Konkurso de Vejĉi-ludo inter Ĉinio kaj Japanio. En la sinsekvaj tri konkursoj, kiuj okazis de 1985 ĝis 1987, aperis preskaŭ sama situacio: Japanio havis ankoraŭ kelkajn ludistojn ne eliminatajn, dum Ĉinio nur ĉefludiston Nie Weiping. Tio montris, ke la ĉinaj vejĉi-istoj ne havis la efektivan kapablon rivali kun la japanaj. Tamen, Ĉinio gajnis la venkon en la sinsekvaj tri konkursoj, dank' al Nie Weiping, kiu gajnis ĉiujn 11 matĉojn, kiujn li partoprenis. Pro tio li fariĝis persono respektata kaj estis honorita kiel majstro de vejĉi-ludo. En sia knabeco li iam ĉesis lerni en lernejo por rigardi, kiel ludi vej-

ĉi-on. Ĉiufoje, kiam li ludis vejĉi-on, li tenis en la mano ventumilon. Li jen disvolvis jen kurtiris ĝin. Venis do konjekto, ke la ventumilo donis al li magian forton, kiu certigis lian venkon. Sed fakte, la ĉefa kaŭzo kuŝis en tio, ke li primajstris vejĉi-on. Lia venko multe pli solidigis la memfidon de la ĉinaj vejĉi-istoj pri reprogresigo de la ĉina vejĉi-ludo. La eminentaj ĉinaj vejĉi-istoj kun Nie Weiping kaj Ma Xiaochun kiel reprezentantoj foje refoje klopodis por atingi la kulminon de disvolviĝo de la moderna vejĉi-ludo kaj, samtempe kun tio, ili kulturis elstarajn junajn vejĉi-istojn venintajn el diversaj partoj de Ĉinio. Ilia malproksimvida laboro estis rekompencita per sukceso en la 90-aj jaroj.

En la mondo la koreaj, japanaj kaj ĉinaj vejĉi-istoj estas preskaŭ egalfortaj. Nun estas tri mondskalaj konkursoj de vejĉi-ludo, kiuj evoluis surbaze de la Defia Konkurso de Vejĉi-ludo inter Ĉinio kaj Japanio. Ili estas konkursoj de Dongyang-valorpapera Pokalo, Fujitsu-pokalo kaj Ying-

pokalo. En tiuj konkursoj vejĉi-istoj de Japanio, Koreio kaj Ĉinio gajnis la ĉampionecon, tamen, ĝenerale dirite, la koreaj vejĉi-istoj estis iom pli fortaj ol la japanaj kaj ĉinaj. Eminentaj ĉinaj vejĉi-istoj estas malpli multaj ol tiuj de Japanio, sed la antaŭaj same bone aŭ eĉ iom pli bone ludis ol la lastaj en gravaj



Nie Weiping (meze) donas konsilojn al junaj vejĉi-ludistinoj.



Ma Xiaochun en la Dua Monda  
Veĵĉi-konkurso de Tristela  
Pokalo en 1997

konkursoj. Ma Xiaochun estas unu el la eminentaj veĵĉi-istoj de Ĉinio. En 1995 li gajnis la ĉampionecon en la konkursoj de Fudjitsu-pokalo kaj Dongyang-valorpapera Pokalo.

La ĉina teamo kun pli ol 20 veĵĉi-istoj vivas kaj trejniĝas en la Ĉina Akademio de Veĵĉi-o en Pekino. La junaj ĉinaj veĵĉi-istoj, elkulturitaj de Nie Weiping kaj Ma Xiaochun, bone disvolvis sin en enlandaj kaj internaciaj konkursoj. Iliaj penema lukto kaj sentimeco al ĉiu ajn forta rivalo estas aparte laŭdataj. Unu el ili estas Chang Hao, kies poentaro, gajnita en enlandaj konkursoj,

estas pli granda ol tiu de Ma Xiaochun. Kaj per tio li okupas la unuan lokon tiurilate en Ĉinio. En la lastaj du Defiaj Konkursoj de Veĵĉi-ludo inter Ĉinio kaj Japanio li venkis eminentajn japanajn rivalojn je sinsekvaj kvin kaj ses fojoj respektive kaj per tio li finis la konkursojn. Tamen, sur lia vizaĝo ankoraŭ ludas infaneco kaj hontemo. Iu eminenta japana veĵĉi-isto diris: "Kiam li atingos la perfektecon, kian mi posedas, tiam li povos multfoje gajni la mondan ĉampionecon."

Chang Hao kaj liaj kolegoj, pli-ol-20-jaraj, ankoraŭ devas multe trejniĝi. Malpli-ol-10-jaraj,

ili fariĝis membroj de la Ĉina Teamo de Geknaboj-Veĵĉi-istoj. Kompreneble, ili estis pli junaj, kiam ili lernis ludi veĵĉi-on en lokaj teamoj. Ĉiutage ili ne nur legas lernolibron, sed ankaŭ uzas sufiĉe multe da tempo por lerni kiel ludi veĵĉi-on. Se tiuj, kiuj estas samaĝaj kiel ili, spertas la valoron de la vivo en legado, ludado kaj amikiĝo, do Chang Hao kaj liaj kolegoj spertas ĝin plej ofte en veĵĉi-ludo. Ili devas posedi pli grandan saĝon kaj pli bonan animstaton por rivali kun eminentaj veĵĉi-istoj de la mondo. Ili devas venki sian memon por percepti veĵĉi-on, perfektigi sian animstaton kaj fine atingi sinforgeson. Lernado de veĵĉi-ludo estas peniga kaj postulas eltenemon de soleco kaj liberiĝon el ĉia logo de la ekstera mondo.

Lee Changho estas eminenta juna veĵĉi-isto de Koreio. 15-jara, li gajnis mondan ĉampionecon en veĵĉi-konkurso. Post la konkurso ĉinaj, japanaj kaj koreaj fakuloj laŭdis lin, ke lia ludarto, kian posedas nur 70-jaruloj, estas solida kaj tute perfekta. Post kiam ĉinaj veĵĉi-istoj rivalis kun li, ili senescepte bedaŭris sian malvenkon. Ili decidis venki lin en la proksima estonteco. Kaj la ĉinaj veĵĉi-maniuloj deziras, ke tiu tago venu frue.

Sub tiu cirkonstancaro la Ĉina Akademio de Veĵĉi-o komencis profesiigan reformadon. Antaŭe la ĉina registaro pagis ĉiujn elspezojn por la ĉinaj veĵĉi-istoj, kio ebligis al ili certagrade dependi de la ŝtato. Post du-jara praktikado, t.e. en 1997, la ĉina veĵĉi-ludo suriris profesiigan vojon. Eble estos bezonata ankoraŭ longa tempo por starigi la profesiigan sistemon de la ĉina veĵĉi-ludo. Kiel diris s-ro Chen Zude, prezidanto de la Ĉina Akademio de Veĵĉi-o, "Akcelado de profesiigo povas sentigi al la veĵĉi-istoj, ke ili ludas veĵĉi-on por sin vivteni, kaj tiel antaŭenigos la ĉinan veĵĉi-ludon." ■

# Amantino de arbaro



Xu Fengxiang sur ilana ponto en Tibeto

“**K**IAM mi unuafoje vizitis Tibeton, mi renkontis ter-falon kaj transpasis riveron kun helpo de kablo. Ŝtonkota fluo kun bruo preterpasis min kiel bombaviadilo. Malgraŭ vertiĝo mi suben rigardis kaj vidis ondegojn. Mi firme tenis la kablون kaj ŝanceliĝe transpasis la riveron, tiam mi ektimis, ĉar mi eĉ forgesis ligi min per sekuriga ŝnuro pro hasto.” La rakontanto, kiu spertis tion, nomiĝas Xu Fengxiang (Ŝju Feng-ŝjang). Ŝi jam estas 66-jara. Antaŭ 18 jaroj ŝi forlasis la okupon en universitato kaj eniris tibetan arbaron, kaj tiam ŝi donis amon al la mistera tero. Ŝia edzo diris, ke ŝi estas amantino de arbaro. Nun ŝiaj haroj jam griziĝis. Parolante pri siaj 18 jaroj en Tibeto, ŝi montriĝis sentoplana, ŝajne ĉio ĵus okazis. “Iunokte ni estis veturantaj tra senhomejo, subite lumo ekbrilis antaŭ ni, kaj ni ĝojjiĝis, ĉar finfine ni povis havi lokon por tranokti. Sed kiam ni atingis la lumon, ni rimarkis ke tie estas lupoj. Ĉirkaŭante la aŭton, la lupoj hurlis. Ni malfacile eliris el la sieĝo kaj kuris la tutan nokton. Ĉe la tagiĝo ni rimarkis ke ni revenis al la antaŭa loko,” Xu Fengxiang rakontis. “Medo estas la plej danĝera loko, kiun ni trifoje vizitis. Ĝi situas ĉe la piedo de Himalajo, en sudorienta Tibeto. Tie la vertikala klimata zono havas preskaŭ ĉiujn specojn de vegetaloj, kiuj kreskas en la regiono de





Xu Fengxiang ĉe rivero en Tibeto

la plej suda parto de Ĉinio ĝis la norda duoninsulo de Arkto. Medo iam estis ununura gubernio de Ĉinio, kie ne estis aŭtovojoj. Se oni volis viziti ĝin, oni devis transiri neĝmonton 4 000 metrojn super la marnivelo, poste marŝi kelkajn tagojn en senhomejo kaj primitiva arbaro, kie vivas diversaj animaloj kaj kreskas diversaj plantoj. Je la unua fojo ni tiel eniris en Medon. Glacio de la monto farigis glaci-ondo, kaj ni devis transiri seĝosimilan glacion laŭ ĝia dorso. La gvidanto diris al ni, ke antaŭ nelonge iu falis de la glaci-seĝo kaj ne supreniris. Li certe mortis de frosto.”

“Ĉu vi ne timis tiel danĝeran stacion?” mi demandis. “Tiam mi ne havis tempon por timi, mi nur pensis pri la mistero, kiun ni tuj malkovros. Granda malfacilo estas granda ĝuo.” Iu homo, kiu esploris Tibeton kune kun Xu Fengxiang, diris al mi, ke tiufoje ili longe vojaĝis kaj finfine trovis raran arbaron, kie arboj estas tiel dikaj, ke neniu el ili povas esti brakumata de kelkaj homoj. Tiam Xu Fengxiang laŭte kriis de ĝojo. Poste ŝi mezuris kaj fotis arbojn. Ŝi estas ankaŭ fotografistino. La alta blua ĉielo, la klara kaj firma neĝpinto, la vasta verda arbaro, la kvieta lago kaj la raraj floroj kaj herboj de la Tibeta Altebenaĵo, ĉio venis en ŝian fotoaparaton. De tiuj belaj fotoj mi komprenas ŝian amon al Tibeto

kaj arbaro. Ŝi diris, ke en la knabineco ŝi multe revis. Iu bela poemo pri arbarkulturisto igis ŝin elekti arbarkulturan fakultaton. Sed la vivo ne ĉiam estas tiel romantika: “Tuj post kiam mi atingis Tibeton, tibetanoj nomas min profesoro ‘guji’ “. “Guji” signifas peti en la tibeta lingvo. Ŝi ĉiam kaj ĉie “guji-is” por plenumi sian esploradon en senhomejo. Ĉiutage kunportante manĝaĵon, ili eniris en arbaron kaj laboris tutan tagon por starigi celstangon, esplori datenojn kaj kalkuli jar-ringojn. Ĉiutage ili devis pesi milojn da kg da branĉoj kaj folioj. En tendaro sub kandelo ili studis raporton pri datenoj ĝis profunda nokto. En arbaro de la altebenaĵo oksigeno estas triono de tiu en la ebenaĵo. Manĝaĵo ne sufiĉis, neĝo estis trinkaĵo. Iufoje pli ol 100 hirudoj suĉis ŝian sangon. Aliffoje ŝi suferis de maligna malario, ŝi svenis pro febro kaj preskaŭ mortis. Dum la lastaj 18 jaroj ŝi esploris en lokoj inter 1 000 kaj 5 000 metroj super la marnivelo kaj trovis arbarojn kun granda rezervo kaj gigantajn arbojn, inter kiuj estas picearo, rigardata kiel valora eltrovo. Ŝia bildlibro “Montoj, riveroj kaj plantoj de Tibeto” estas konsiderata de Monda Terglobo-protekta Asocio kiel brila atingo. Ŝi diris,

ke ŝi fondis la Instituton de Altebenaĵa Ekologio. Sur foto, la instituto estas ordinara

ligna dometo. Iu verkisto, kiu estas kortuŝita de ŝiaj faroj, verkis artikolon “Ligna dometo en arbaro”, kiu temas pri ŝi. La artikolo aldonis misteron kaj romantikecon al la dometo. Kiel mastrino de la dometo, ŝi diris: “Krom esplori altebenaĵan ekologion, mi ankaŭ zorgis pri divido de ekologiaj tipoj kaj pri ekologi-ekonomia evoluo kaj prelegadis al terkulturistoj kaj brutobredistoj. Mi havas multon por fari.”

Xu Fengxiang malrapide rakontis pri si mem. Kiam ŝi menciis siajn familianojn, ŝi ploris. “En la lastaj 18 jaroj miaj edzo kaj filino iam laboris kune kun mi en Tibeto. Nun mia edzo estas preskaŭ 70-jara, kaj lin akompanas tibeta hundo, kiun mi donis al li. Multfoje mi decidis akompani mian edzon kiel bona edzino, tamen la arbaro de Tibeto allogis min.” Nun Xu Fengxiang planis fondi la Tibetan Muzeon en antaŭurbo de Pekino. Ŝi montris arbid-kultivejon kaj diris al mi: “Tio ĉi estas blanka peonio, tio estas... Ili venis ĉi tien el Tibeto per aviadilo por konigi Tibeton al pli multe da homoj kaj rapidigi evoluon de Tibeto.”

Xu Fengxiang diris al mi: “Post unu monato mi iros denove al Tibeto por esplorado.” ■

# Maljunulo Sa

(Novelo)

**L**I estis pilkostelo, li estis ankaŭ enprizonigita pro misakuzo — en sia vivo li spertis kaj fieron kaj suferon. Maljuniĝinte li nur interesiĝis pri virinoj kaj dancarto. Li estis maljunulo Sa, kiun laŭdis ĉiuj liaj disĉiploj.

Kun sia propra stilo maljunulo Sa dancis gracie, tiel altiris al si nombron da fraŭlinoj kaj sinjorinoj.

La disĉiplinoj ĉiuj ŝatis maljunulon Sa. Pri tio la disĉiploj konjektis: Certe li posedis sekretan allogaĵon; se ne, li, malpura kaj ĉifonvestita, ne povus akiri favoron de tiel multe da virinoj.

Kiel fortuloj en la dancista rondo maljunulo Sa kaj liaj disĉiploj aktivis aŭ en subĉiela dancejo aŭ en danc-salono. Aliaj dancamantoj enviis ilin kaj volis aliĝi al ili.

Iun tagon Grasulino kondukis Liu Fang en la societeton de maljunulo Sa. Nek parolanta nek ridanta, la nov-veninto sidis kun indiferentaj okuloj. Ĝenerale en ĉiu tago la disĉiploj havis po unu ŝancon danci kun maljunulo Sa kaj ili fieris pri sia partneriĝo. Sed Liu Fang ne ŝajnis sin ekscitita, kiam venis ŝia vico danci kun maljunulo Sa: Ŝi malvarme akceptis lian inviton, eĉ ne rigardante lin. Tio iom malĝojigis lin. Tamen post kelkaj paŝoj li surpriziĝis pri ŝia talento malgraŭ ŝia nelerteco... Ŝajnis al li, ke li la unuan fojon renkontis tiel taŭgan partneron. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi dancis ne kun unu viro sed kun ĉiuj viroj. La de li disvastigataj sugestoj ebligis al ŝi prezenti maksimume la leviĝon kaj malleviĝon, la rapidon kaj malrapidon, la fortecon kaj malfortecon de la melodio.

Finiĝis la melodio, tamen ne finiĝis la plezuro, do la dancanta paro plu dancis por 3 melodioj. La aliaj disĉiplinoj terure enviis ŝin, nur Grasulino senĉese laŭdis: "Liu Fang, kiel brava vi estas!"

Tiel pasis kelkaj tagoj, la disĉiplinoj elpen-

sis ruzaĵon: Tuj kiam maljunulo Sa eniris en la dancejon, ili alterne dancis kun li, ne ebligante al li kontakton kun Liu Fang. Li tion travidis, tamen li restis kvieta. Escepte de Liu Fang, ĉiuj jam dancis kun li, kaj venis la dua alterno. Refoje kun kontento al li iris Belulino, kiu ofte pretendis, ke ŝi estas lia plej intima disĉiplino. Ekster ŝia atendo, maljunulo Sa sin direktis al Liu Fang, kvazaŭ ne vidante ŝin. Perdante la vizaĝon antaŭ la publiko, Belulino ruĝiĝis kaj foriris kun larmoj.

Tio embarasis Liu Fang. Dum dancado ŝi diris al maljunulo Sa:

"Pardonu, ke mi ĝenis vin ĉiujn."

"Ŝi nur kapricas kaj revenos post kelkaj tagoj," li trankviligis ŝin.

Abrupte li murmuris kvazaŭ al si mem:

"Por venko ne konvenas tro multe da vetaĵo. Se vi vetas je ĉio via en unu fojo, atendos vin la perdo."

Malgraŭ nekomprene Liu Fang sentis la vortojn rilataj al ŝi. Kiam ŝi forlasis la dancejon, ŝi ekkonsciis, ke li, informiĝinte pri ŝia travivaĵo, evidente donis konsilon. Jam en la infaneco ŝi estis fama pro sia lerteco en kantado kaj dancado. En pli ol dek jaroj post sia edziniĝo ŝi per sia tuta energio helpis la edzon en lia kariero. sukcesinte, la edzo iris Usonon kaj perfidis ŝin. Ŝi ne mortis, tamen ŝia animo estis morte vundita. La vortoj de maljunulo Sa vekis ŝin: Jes, fronte al la sortŝanĝo, ŝi nur pensis pri indigno al la edzo, sed neniam meditis, kial ŝi perdis lin. Ŝi stulte metis sian tutan vivon kiel vetaĵon sur la edzinecon. Tiel ŝi pensis kaj multe reduktiĝis ŝia malĝojo...

La sekvantan tagon Liu Fang sentis malvarman rigardon de ĉiuj disĉiplinoj. Ŝi sciis, ke tion kaŭzis la okazaĵo en la lasta tago. Ŝi denove malĝojigis: Fakte la dancejo ne estis tiel senkverela

kiel ŝi esperis. Ŝi decidis forlasi la societon de maljunulo Sa.

Poste ŝi trovis ie subĉielan dancejon. Tamen tie ŝi estis atakata de soleco kaj enuo. Iun tagon ŝian rigardon subite kaptis iu konata figuro: Maljunulo Sa, sin apogante sur balustrado ĉe la dancejo, kun cigaredo en la buŝo, atentis ŝin. Ŝi rapidis al li.

“Kial vi foriris sen sciigi min? Mi serĉadis vin. Revenu al ni! Ili nur enviis vin, ne gravas!” Aŭdinte la vortojn, Liu Fang sekvis lin kun hontemo kaj kortuŝeco.

La disĉiplinoj bonvenigis ŝin, kvazaŭ nenio okazus. Maljunulo Sa kaŭrante fumis, ekradiis de ĝojo.

La societo restarigis siajn harmonion kaj viklecon.

Monatoj pasis, multe progresis la dancarto de Liu Fang, kiu nun eĉ disputis kun maljunulo Sa pro malsama opinio pri dancmovoj aŭ pozoj. Ĝuste tiam la televido transsendis konkurson de internacia norma dancarto, tio fascinis Liu Fang. Dum dancado ŝi intencis imiti la movojn de la internacia norma dancarto kaj estis en malkonkordo kun maljunulo Sa... Finfine ŝi apartiĝis de la societo.

Nelonge post ŝia foriro, cirkulis multaj informoj pri ŝi, ke aperis en la dancista rondo nova grupo, kies gvidantoj estas Gao Yougui, fama

danc-instruisto de la Popola Arta Domo, kaj Liu Fang. La disĉiploj pri tio diskutis, kaŝe observante maljunulon Sa. Li ne montris surpriziĝon, tamen lia senĉesa fumado malkaŝis lian ĉagrenon.

Neniu atendis, ke Gao Yougui kaj Liu Fang aŭdacis eniri en la terenon de la societo de maljunulo Sa. Kiam la aroganta paro enpaŝis en la dancejon, ĉiuj disĉiploj de maljunulo Sa koleris pro la maldankemo de Liu Fang. Tamen ili ne povis ne konfesi, ke en la du invadantoj vidiĝas nobleco. Precipe la mezaĝa Gao Yougui, kun alta staturado, delikata vizaĝo kaj brila hararo, aspektis pli impone ol maljunulo Sa.

Antaŭe la societo de maljunulo Sa okupis la nordorientan parton de la dancejo, nun la sudokcidentan angulon okupis la grupo de Gao kaj Liu. Je la komenco Gao kaj Liu ne kuraĝis tro montri arogantecon kaj pacis kun maljunulo Sa. Tagoj pasis, nerimarkite naskiĝis konkuro. Kelkaj disĉiploj de maljunulo Sa opiniis la dancarton de Gao kaj Liu pli eminenta kaj estis altiritaj. Ĉiuj, ĉu viandvendisto, ĉu legomvendisto, ĉu purigisto, ĉu barbiro, post lernado ĉe Gao kaj Liu fariĝis kvazaŭ ĝentlemanoj. Pri tio maljunulo Sa nur kuntiris la brovojn dirante nenion.

Iun vesperon, aperis en la dancejo multaj nekonataj figuroj en luksa kostumo. Eble io okazos?

Nelonge post la aŭdiĝo de muziko, en la sud-





okcidenta parto pli kaj pli grandiĝis la homamaso. Aplaudite de la spektantaro, Gao kaj Liu riverencis al la publiko kaj gracie ekdancis, akompanate de muziko. Ilia prezentado gapigis la spektantojn. Subite Liu Fang faris turniĝon sur unu piedo, Gao Yougui ĉirkaŭrigardis, ne kasantate sian fierecon, kaj pro malatento faligis Liu Fang sur la plankon... Bruis la homoj. Gao konsterniĝis, ruĝiĝis, eĉ laŭte plendis:

“Kiel vi dancas!”

Liu Fang ankoraŭ ne stariĝis. Honto kaj la plendo plorigis ŝin.

Bruegis la homoj. Kun sufokiĝo Gao Yougui foriris.

Esti forlasita de partnero dum dancado estas malhonoro por dancantoj. Do oni scivoleme atendis, kiel Liu Fang sin eliros el la embaraso... Ĉe tiu momento enpuŝiĝis iu homo, kiu estas neniu alia ol maljunulo Sa. Li aplombe iris al Liu Fang, per bela dancmovo malrapide starigis ŝin, kaj laŭe ŝi iom post iom turniĝis... En laŭdado de homoj maljunulo Sa laŭeble klopodis por danciĝi Liu Fang kiel papilio... La drameca incidento okazis dum tempodaŭro de nur unu melodio. Pro ekscitiĝo la spektantoj aplaudis kaj aplaudadis.

Maljunulo Sa akompanis Liu Fang reveni en la societon. La lasta larmis de honto kaj la disĉiploj konsolis ŝin. Antaŭ la publiko Liu Fang diris al maljunulo Sa:

“Majstro, riproĉu min! Mi estas konvinkita ĝisfunde.”

Maljunulo Sa longe enspiris tabakon:

“Ve! Bone estas vivi kaj danci kun fideleco kaj libereco. Tamen tio ne estas ellernebla, tio estas naturdotita.”

Ĉiuj disĉiploj remaĉis liajn vortojn, diris nenion kaj ŝajne komprenis ion.

Post la incidento, rememorante sian travivaĵon, Liu Fang komparis Gao Yougui kun maljunulo Sa. Ŝi konsciis, ke maljunulo Sa efektive montras sian naturon ĉu en dancado ĉu en la vivo. Tial li vivas prudente kaj dancas nesupereble admirinde.

Rekvietiĝis la societo.

Proksimiĝis la naskiĝtago de la majstro. La disĉiploj preparis celebran balon. Liu Fang estis aparte aktiva. Tio ĝojigis maljunulon Sa. Tamen li agis strange. Ordinare li dancis unu aŭ du fojojn ĉiutage. Nun li aŭ malaperis por tuta tago, aŭ dancis kvar fojojn en unu tago. Demandite li klarigis:

“En la lastaj tagoj mi estis okupita pri la familiaj aferoj: garni la balkonon, helpi la filinon

transposteniĝi...”

Du tagojn antaŭ lia naskiĝtago, Liu Fang malsaniĝis de laciĝo. Informiĝinte pri tio, maljunulo Sa kune kun Grasulino vizitis ŝin en vespero. Lia alveno ekscitis la malsanulinon, kiu tamen apenaŭ havis forton regali ilin. Maljunulo Sa devigis ŝin kuŝiĝi kaj surtabligis manĝaĵojn aĉetatajn survoje. Kolbaso, bakita kuko, boteleto da vino... ĉion ĉi ĝuis la majstro kaj la du disĉiploj. Trinkante vinon, Liu Fang sondis:

“Majstro, ni havas demandon: pro kio vi estas tiel altira por virinoj?”

Grasulino aldonis:

“Certe, ni neniam klare scias pri tio. Ĉu pro via dancarto, aŭ via karaktero, aŭ via indulgemo, aŭ via zorgemo al virinoj, aŭ la sento de virinoj pri sekureco ĉe vi...?”

Aŭskultinte, maljunulo Sa ridis:

“Vi opinias la aferon tro kompleksa. Iuj venas en la dancejon por sin amuzi, aliaj por sin konsili, triaj por serĉi amaton aŭ amatinon... Famo kaj profito lacigas la homojn. Virinoj vivas kompare pli simple, tamen ankaŭ ili havas multe da ĉagrenoj. Kaj mi volonte servas al virinoj... Plie, vi troigis mian bonon, kiun vi mem fakte posedas.”

Liu Fang pensis pri la vortoj preskaŭ tutan nokton.

En la sekvanta frumateno, ŝi vekiĝis de urĝaj frapoj je la pordo. Ŝi malfermis la pordon kaj vidis Grasulinon, kiu ne povis regi sin pro plorsingulto: “Ĵus la majstro mortis de cerba hemoragio!”

La funebra ceremonio okazis post 3 tagoj. Tiam oni unuafoje vidis la edzinon de maljunulo Sa. Fakte, antaŭ dekoj da jaroj ŝi gravediĝis en neleĝa seksa vivo kun iu viro kaj ne estis pardonita de la familianoj kaj la socio. Maljunulo Sa kompatis ŝin kaj edziĝis al ŝi. Li eĉ lasis ŝin plu kontaktiĝi kun la amato, kaj li mem restis nur nominala edzo por dekoj da jaroj.

La funebra procesio plenis de floroj kaj virinoj. El plorĝemoj sonis la melodio “Transformiĝo en papilion”, kiun maljunulo Sa plej ŝatis.

Sen maljunulo Sa la dancejo ankoraŭ estis movoplana. Gvidate de Liu Fang, liaj disĉiploj esprimis, ke ili disvolvos la dancarton de maljunulo Sa.

Liu Fang sin trejniĝis ĝis sinforĝeso. Malgraŭe pli kaj pli malmultiĝis la sekvantoj. Finfine disĝis la societo. Nur la nomo de maljunulo Sa estis ofte menciita de homoj...

Elĉinigita de **XIANG HONG**

# Pentraĵoj de Zheng Banqiao



Zheng Banqiao (1693-1765) estis fama pentristo kaj literaturisto de Qing-dinastio (1644-1911). Dum sia junaĝo li vivis malriĉan vivon. Li iam laboris kiel guberniestro. Honesta kaj simpatia al la loĝantoj, li estis kalumniita de koruptiĝintaj oficistoj. Pro tio li forlasis sian postenon, transloĝiĝis en Yangzhou, Jiangsu-provinco, kaj vivis de vendado de pentraĵoj. Li lertis en verkado de poemoj kaj pentrado de orkideoj kaj bambuoj. Liaj poemoj kun libera stilo spegulas lian ambicion kaj malcedemon al la maljustaĵoj. La orkideoj kaj bambuoj, kiujn li pentris, imponas per originaleco. Li renomiĝis kiel unu el la 8 famaj originaluloj de Yangzhou.

En 1993 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis tiun poŝtmarkoserion el 6 pecoj pri liaj pentraĵoj.







Karnavalaj maskoj  
en Binche  
de **J-CLAUDE  
THUMERELLE**  
(Belgio)



Karnavalo de  
Venecio  
de **RODOLF  
SKORUPPA**  
(Germanio)

ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九八年 第二期

(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2